



4·90*139*

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



El viaj leteroj

En la kvara numero de Starto, sur la paĝoj 24-25, mi legis artikolon "La perdita samideanino", kiu embarasis min kaj mi ne povas konsenti kun skribintino Maja. Se ŝia kolegino, kiel Maja skribas, estas inteligenta fraŭlino kiu scipovas bonege kelke da fremdaj lingvoj, mi ne komprenas, kial ŝi volas eĉ ne aŭdi pri Esperanto.

Mi komprenas, ke ŝia travivaĵo certe ne estis agrabla por ŝi. Mi kredas, ke renkontado kun ĉi tiuj homoj estis ŝoko por ĉi tiu fraŭlino. Tiaj homoj, kiuj vizitis ŝin, certe ne interesigas pri E-movado, sed ili interesigas nur pri ŝia propra profito. Bedaŭrinde eĉ tiaj homoj troviĝas inter esperantistoj, kvankam ili ne estas multaj. Kaj ankaŭ estas vero, ke niaj opinioj formigas laŭ niaj unuaj impresoj kaj ekkonoj. Domage, la unua impresoj de ĉi tiu fraŭlino estis tre malbona, malagrabla.

Sed laŭ mia opinio tio estas neniu motivo por foriro el niaj vicoj. Ĉi tiu fraŭlino havas rajton kritiki nur "esperantistojn-vizitantojn", kiuj sonorigis ĉe ŝia pordo, ŝi havas rajton publikigi iliajn nomojn, por ke ili ne ripetu siajn vizitojn plu. Sed ne estas eble diri: "Vidu vian bonegan Esperanton...!", ĉar Esperanto vere estas lingvo de amikeco kaj frateco kiu faciligas interkomprenigon kaj ligas homojn de ĉiuj rasoj, landoj kaj kontinentoj.

Ne estas eble kunigi Esperanton kun senkarakteraj homoj. La homo, kiu kapablas diri tiujn ĉi vortojn, ofendis Esperanton kaj estos plej bone, kiam li forlasos niajn vicojn, ĉar li neniam havis pozitivan rilaton al Esperanto.

Fine mi volus diri al nekonata fraŭlino, ke mi estos plus entuziasma esperantisto kaj mi batalos por ekflorado de Esperanto. Domage, ke Vi kapablis tiamaniere adiaŭi al Esperanto. Jaromír Kolek, Bruntál

Mi tralegis la ricevitaĵajn numerojn, kaj ĝojas pri la bona kunlaboro kun la fervojista fako; tia bona arango ne ekzistas en ĉiuj asocioj. Mi ankaŭ legis la bonan reliefigon de la lokaj kluboj en la bulteno, en kelkaj paĝoj vi donas la parolojn al ĉiuj, kio certe dinamikiĝas ilin.

Ankaŭ interesis min la tuta pago pri sekcio de invalidoj.

La ĉefartikolo en paĝo 1 de Starto 4 insistas tute taŭge pri la avantaĝoj de la fakoj, do de la praktikaj servoj en nia movado. Vi ankaŭ pravas, ke E-movado bezonas ian perestrojka - alikonstruo, miaj rilatoj plurjaraj kun la L.A. montris al mi la gravan diversecon, kiu certe bremsas la evoluon. Tio estas normala se la politikaj regimoj ne samas, sed malgraŭ tio, ĉiuj ni havas egalajn laborpovojn, kaj similajn prienskapplejojn, kiuj devus renkontigi nin pli ofte. Ni akceptas diversecojn, ĝis tia nivelo, ke ofte tio nuligas la avantaĝon de komuna lingvo!

Ankaŭ mi (kaj ni la francoj) preferas batali sur la kampo de perkorespondaj kursoj, kaj mi miras pri viaj 450 lernantoj samtempe kun 20 prizorgantoj. Kiamaniere vi reklamas? Kiam multajn lecionojn? Ĉu vi postulas apartan kotizon aŭ ĝi estas ligita al amiko al la asocio?

La letero de la perdita samideanino indus esti diskonigata ĉar ĝi vere ekzemplas.

Jean-Louis Texier

Angela Bode

REMEMOROJ PRI BOHEMIO

/El miaj vojaĝoj al Ĉeĥoslovakio/

Belegis la tagoj en land' Bohemi',
ĉi-lando en suna brilorio,
amikojn sincerajn mi trovis en ĝi,
portatajn por ĉiam en koro.

Mi amas la montojn sub verda arb-teg',
la multajn lagetojn kaj lagojn,
herbejojn kaj kampojn ĝis fora vastag'
kaj alte ŝvebantaĵn nubvagojn

la pontojn de Prago en lum' de vesper',
de Elbo glimantan rubandon,
la kantojn kun ties popola sincer',
gastamon markantan ĉi landon.

Ŝoseo rapidas tra lando al for',
malnovajn kampdomojn pasadas,
al urboj de famo tutmonda kaj glori',
al lokoj ĉi, kiujn mi ŝatas.

Ĉu Špilberk', ĉu Petrov, ĉu Praga kastel',
aŭ ĉu katedral Sankt-Barbara,
ĉu Ústí nad Labem, burg' Strěkov juvel',
ĉio ĉi al mi estas kara.

Nacia Teatro fariĝis avent',
Smetana-muzikon mi ĝuis,
defiloj de artoj, ho kia ektent',
mi eĉ ne momenton enuis.

Veturo laŭ Sázava plenis de ĝoj',
kaj en Sokolov la ripozo,
tra Doubavka-val' romantikis la voj',
kun neforgesebla rav-dozo!

Mariánské Lázně, al sano la pont',
kuracas pin fonto-regale,
sed ankaŭ alia kun marko "Prafont"
soifon forigas egale.

Domažlice! Klatovy kun kriptoj en kel',
en kiu mumioj nur gardas
admone: "Hom', ĝuu sur bela ĉi ter'
la vivon pli frue ol tardas!"

Kasteloj kaj burgoj en riĉa vari',
la beloj de urboj inkludas
konstruojn de nuno kaj el histori',
en ili la ambaŭ apudas.

La vortojn de lingvo fremdeta en son'
nun lernas mi ĉate kompreni,
de la "Fiancino Vendita" ekkon'
min logas ĉi-landen reveni!

Mi ĝojas, ke flirtas la flagoj de pac',
ke limoj ne estas disigoj,
ke homojn kompreni sin vokas sagac',
ke ili sin nomas "Amikoj"!

El la germana lingvo tradukis:
Jiří Kořínek, 1981

Kontrakto pri kunlaboro inter Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Ligo
de Bosnio kaj Hercegovino por 1990

En la jaro 1990 la kunlaboro inter ambaŭ asocioj disvolvigis precipe sur la kampoj de kulturo kaj turismo.

I. Kultura kunlaboro:

1. Intersanĝado de E-gazetoj Jugoslavia Stelo kontraŭ Starto po 10 ekzempleroj.
2. Intersanĝo de ĉiuj noveldonitaj libroj po 2 ekzempleroj.
3. Intersanĝo de instruistoj en someraj kursoj por infanoj kaj por plenkreskuloj. En Jugoslavio temas pri la Junpionira E-Somero (21.6. - 5.7.1990) kaj Somera E-Lernejo (5.-15.7.1990), en Ĉeĥoslovakio temas pri Somera E-Tendaro en Lančov.
4. Laŭebla intersanĝo de prelegantoj por publikaj prelegoj en E-klubo au kulturaj centroj pri komune interkonsentotaj temoj kaj kondicioj.
5. Intersanĝo de libroj kaj aliaj esperantaĵoj por distribuo al la membraro au aparta interkonsento inter la Libroservo de ELBKĤ kaj Informoservo de ĈEA.
6. Intersanĝo de po proksimume 5 gejunuloj en junularaj labor-tendaroj organizotaj.

II. Turisma kunlaboro:

Intersanĝo de turismaj grupoj surbaze de t.n. sendeviza intersanĝo laŭ apartaj ofertoj de ambaŭ flankoj. Kompletajn ofertojn por 1991 ambaŭ asocioj prezentos ĝis 15.12.1990 kaj ĝis la fino de februaro estu konsentote pri konkreta kunlaboro.

III. Ceteraĵoj:

1. La du flankoj strebu ke kultura kunlaboro eniru oficialan interŝtatan kontrakton pri kultura kunlaborado, kiun adekvataj registaraj instancoj subskribis ĉiun trian jaron.
2. Post unu jaro reprezentantoj de ambaŭ asocioj prijuĝu efikon kaj rezultojn de la kunlaboro kaj laŭ spertoj atingitaj pri traktu kaj subskribu la kontrakton por sekvanta jaro, resp. por sekvantaj jaroj.

En Sarajevo, la 19a de novembro 1989.

Por ĈEA:
Petr Chrdle p.m.
prezidanto de ĈEA

Por ELBKĤ:
Senad Čolić p.m.
estrarano de ELBKĤ

Jean-Louis Texier

LA EKSTERA IDEO

La movado foje batalas, ĉu ĝi koncentru siajn fortojn kadre de la Zamenhofa interna ideo, ĉu ĝi enpaku ĉiajn strebojn ekstere de idealaj aspektoj. Iuj prioritatas al nura rekta parola informado ĉe najbaroj kaj konatoj; aliaj preferas enviivisian verdan komunumon kalkulante je ĝia natura allogeco. Ekzistas samideanoj, kiuj nur pensas al amaskiigo fare de politikaj au sociaj instancoj; ceteraj sin dediĉas al varbokampanjoj laŭ amatoraj kriterioj, kaj sen buĝetaj implico. Tiuj kvar vojoj estas lasitaj al la placo de lokaj grupoj, kiuj ne emas al programita politiko. Ankaŭ estas la multaj izolitoj ne enplektitaj en iun ajn propagandon.

Fresdata esplorado ĉe la landaj asocioj montras, ke la tuta konata movado kreas ĉiujare malpli ol 30.000 eklernantojn, el kiuj eĉ ne 3000 ĝisvivis la unuan jaron ĉe ni, kio ofte nur kompensas konstantajn perdojn pro senintereso, laciĝo au morto. Oskar Princz ĵus montris en tre preciza enketo, ke lokaj statistikoj reliefigas la saman konkludon: ĉu per tiuj rezultoj esperanto ĝisvivos duan plenan jarcenton?

Mi mem, daŭre, sed pli detale en la lastaj monatoj, trakribis la diversajn organojn de niaj L.A., kiuj, logike, estas la bildoj de la organizita movado. Levigas ses respondotaj demandoj:

- 1) ne abundas nacilingvaj bultenoj por la amaskomunikiloj -
- 2) ne aperas la prezentado de lokaj varbprojektoj -
- 3) sekve ne vidiĝas iliaj pozitivaj au negativaj rezultoj, kiuj havas intereson por alilokaj gekolegoj -
- 4) ne svarmas la servoj proponebaj al novbakitoj -
- 5) ekaperas, iom dise, sed sen granda konvinko, la propedeŭtika argumento, ke esperanto faciligas studadon de aliaj lingvoj
- 6) preskaŭ nenie estas aludita la ebleco al planita (eventuale pagota) reklamo, kiu povus esti translima; eble kialas ĉi tie la praa timo nomi esperanton varo.

Jen, proponebaj sugestoj:

Asociaj esperantlingvaj bultenoj nepras por fideligi la anaron kaj helpi la komencantojn resti en la asocia kadro; sed mi kuraĝas aserti, ke la duonon de la strecoj oni sparu (se oni ne havas pliajn rimedojn) por monataj unupaĵaj cirkuleroj, au trimestraj bultenetoj en la loka lingvo por senlace bombardi la grandajn informkanojn. La informoservo de U.E.A. ĵus anoncis ke ĝi pretas helpi tiudirekte. Insistu al ĝi ke ĝi resendu al vi la materialon, kiun ĝi povas kompili el ĉiuj fontoj.

La manko de raportoj malebligas konstati kaj la sukcesojn, kaj la fiaskojn. Estas ampleksa intersanĝo de landaj organoj. Ili diskonigu spertojn, kiujn, en aliaj asocioj, oni povas kopii au adapti, depende ĉu la sekvoj estis valoraj au ne. Abundadas en REVUE ESPERANTO, kaj ĉefe en HEROLDO DE ESPERANTO arangoj, solenoj, prelegoj, kunvenoj ... kiuj ĉiam pretakstas al prezento de la internacia lingvo. Sed malofte oni legas pri la preparoj, kaj la efektivaj rezultoj. Meniam statistikoj! Komparoj al alies spertoj povus ankau instigi al laborĉameliĝoj inter samnivela asocioj, au al patronhelpo de pli sukcesa al malpli forta.

Aktivaj au emeritaj instruantoj ege proporcias en nia anaro. Ili havas la moralan devon prepari la materialon, kompili la pruvojn, eĉ estigi la eksperimentojn por ke ĉiuj uzu la argumenton pri la perada rolo de esperanto por lerni aliajn lingvojn. Ofte tiaj homoj ne emas al varbado, jen do alia egalvalora hobia! Tiu tasko estas tion eminenta, kiom la multaj seminarioj, stagoj, vortardebatoj en kiuj ili plenas!

Ni pensu, ke, se unu terloganto el 100, kiun oni trudas al la angla lingvo, estus proponita trejniĝi per esperantolernado, ni jam milobligus nian merkaton da ekler-nantoj, sekve, da finlernantoj.

Majbaraj landoj kiel Japanujo kaj Ĉinujo, Belgujo kaj Britio, Brazilo kaj Kolombio ege malsimilas je homrimedoj; sed ni scias, ke delonge, internaciaj firmaoj, sen komuna lingvo, kapablis eltrovi adaptitajn vendosistemojn. Nia minuso estas la financa kapablo, sed ni havas tri plusejojn: konsiderinda fervoro, senlima merkato kaj komuna lingvo!

Ni devas vendi al la ekstera mondo tiun nian koncepton ke pli facila komunikado estas unu el la homaj rajtoj.

Ĉu vi konsentas?

(Mallongigite.)

D-ro Ing. Ludvík F r i t s c h forpasis

La 26-an de decembro 1989 forpasis elstara esperantisto, honora membro de ĈEA s-ano D-ro Ing. Ludvík Fritsch.

Li naskiĝis la 24-an de majo 1910. Sian inĝenieran diplomon li ricevis en la j. 1937 post la studoj en la Altlernejo de Kemi-Teknologia Inĝenierio, kaj en la jaro 1939 li estis promociita al doktoro de tekniko. Li laboris precipe en la industrio de celulozo kaj papero kaj farigis elstara ĉeĥoslovaka fakulo en ĉi tiu teknologia branĉo.

Apud fakaj kaj organizaj laboroj en sia specialaĵo li ankaŭ uzadis siajn largajn lingvajn sciojn (krom Esperanto kaj la ĉeĥa li regis la anglan, francan kaj germanan lingvojn) por la kunlaboro super vico da fakaj vortaroj.

Tamen li ne fordonis siajn kapablojn kaj konojn nur al la celuloza - papera specialo - longajn jarojn li laboris por Esperanto, precipe sur la kampo de ĝia apliko en scienco kaj tekniko. Li estis aktiva membro de la scienco-teknika sekcio de ĈEA ekde ĝia fondiĝo. En novembro 1974 oni elektis lin presidento de la sekcio; en ĉi tiu funkcio li laboris sukcese ĝis la 19-a de marto 1982, post tiu dato li funkciis kiel vicpresidento de la sekcio. Ekde la 5-a kongreso de ĈEA, kiam okazis ankaŭ konferenco de la sekcio la 13-an de septembro 1987, li estis honora presidento de la sekcio. En la jaro 1982 li estis ĉeforganizanto de la seminario "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko" en České Budějovice, kie estis diskutataj problemoj de la energi-fontoj. Li estas aŭtoro de vico da fakaj artikoloj kaj prelegoj en Esperanto, ne nur el la sfero de sia ĉefa fako - li kontribuis eks. ankaŭ al la revuo "Esperantisto Vegetarana".

Sian sindonemon li pruvis ankaŭ dum la laboroj super la granda ĉeĥa-Esperanta teknika vortaro en la jaroj 1971 - 1983, kiam li estis la ĉefa kunlaboranto de Ing. Bednařík. Kvankam la vortaro, pro sia amplekso, ĝis nun estis publikigita nur en fragmenteto, ĝi farigis valora fonto de kelke da dekmiloj da terminoj el la sfero de tekniko kaj natursciencoj.

Li aktive partoprenis en vico da kunsidoj, seminarioj kaj konferencoj pri Esperanto, resp. pri ties aplikebloj en sciencaj sferoj (eks. en Ahrenshoop).

Lia nomo estas nedisigeble ligita kun la evoluo de nia scienco-teknika sekcio, kies sukcesa agado dum la lastaj du jardekoj estas certe ankaŭ lia granda merito.

sp

HENRIKO SEPPIK FORPISIS

La 4-an de februaro 1990, kvin tagojn antaŭ sia 85-a naskiĝtago, mortis Henrik SEPAMAA, laŭ la civitana nomo Heinrich SEPIK. Li naskiĝis 1905-02-09 en Pärnu /Estonio/, en la jaroj 1918-24 studis en Tallinn humanisman gimnazion por knaboj, kie elkreskis lia intereso por Esperanto. En 1925-29 li studis en Tartu-Universitato la estonan kaj romanon filologiojn. Jam dum la studoj li eklaboris kiel instruisto de Esperanto, unue en Estonio kaj poste en 1929-39 en Svedio, Norvegio, Danlando kaj Ĉeĥoslovakio. Li aktivis ankaŭ kiel tradukisto. Dum 1947-56 li suferis stalinisman teroron en Komi. Post reveno hejmlanden li dediĉis sin al tradukado de nordlandaj verkistoj. En la estonan li tradukis pli ol 40 librojn, ekz. de A.Strindberg, K.Hamsun, M.Andersen Nexø, H. Laxness k.a. Ekde 1984 li estis honora membro de la PEN-klubo de Norvegio.

Henrik Sepamaa estis entombigita en Tallinn 1990-02-10.

Pri la agado de nia amiko Seppik - Sepamaa - en Ĉeĥoslovakio estas menciite en la verko de S.Kamarýt "Historio de la Esperantomovado en Ĉeĥoslovakio", paĝoj 121-122.

A.A. - J.W.

Dum sia estado en Ĉeĥoslovakio antaŭ la dua mondmilito, s-ano Seppik verkis kelkajn artikolojn por nia tiama gazeto "Ligilo". Jen ni prezentas fragmenton el unu el tiuj artikoloj pri lingvaj eraroj de ĉeĥaj esperantistoj.

Jam dum multaj jaroj instruante en pluraj landoj, mi ofte konstatis, ke Esp. estus multe pli facile lernebla ankaŭ por tute simplaj kaj nekleraj homoj, se ili ne estus tiom katenitaj al sia gepatra lingvo, se ili povus logike kaj klare pensi kaj ne imitadus blinde la naciajn lingvojn. Vere, Esp. per si mem estas tiel simpla, facila kaj regula, ke ellerni ĝin estas pure infana ludo, des pli, ke granda parto de ĝia vortprovizo estas komuna al ĉiuj kulturlingvoj kaj sekve komprenebla al ĉiu iom inteligenta homo jam antaŭ la lernado. Se al iu ĝi tamen saĝnas malfacila, tiam kulpas estas ne Esp., sed lia propra gepatra lingvo, al kiu li estas troe katenita. Ĉe la lernado kaj uzado de Esp. liberigu do de via gepatra lingvo, pensu rekte en Esp. kaj ne imitu blinde vian nacian lingvon!

Jen kelkaj tipaj ĉeĥoslovakaj eraroj, ĉeĥismoj, slovakismoj kaj germanismoj, kiujn mi ĉiutage renkontas tie ĉi: 1. Mi "beĥavas" tempon (anst. ne havas, ĉar en Esp. kaj ĉiuj aliaj lingvoj, kiujn mi konas - estona, rusa, finna, sveda, norvega, dana, franca, itala, hispana, portugala - ne kaj verbo estas skribataj kaj elparolataj ĉiam aparte, neniam kune). 2. Morgaŭ mi "estos skribi" (= skribos) Esperantan leteron (antaŭ unu jaro mi eĉ ne povis songi, ke tia eraro entute estas ebla!). 3. "Jest" (= jes), mi komprenas. 4. Hodiaŭ mi "faros tradukanton" (= estos tradukanto aŭ funkcios kiel tradukanto). Kiamaniere oni povas "fari" tradukanton? Ĉu el argilo aŭ ligno? 5. Preskaŭ ĉiuj en ĈSR diradas "kurso, konkurso, diversaj, konversacio, penzi, konsumi, brasiko, desegni, intereso" ktp. anst. la ĝustaj kurso, konkurso, diversaj, konversacio, pensi, konsumi, brasiko, desegni, intereso, ktp. 6. Eĉ nun ankoraŭ mi malfacile komprenas, kiam oni diras al mi: Venu al mi "kvaronon de la sesa"! Kion tio signifas, ĉu kvaronon antaŭ la sesa aŭ kvaronon post la kvina? Logike tio devus signifi "kvaronon antaŭ la sesa", ĉar de montras ja deiron, devenon. 7. La frazon "mi skribos al vi en kelkaj tagoj" mi komprenis "dum kelkaj tagoj", kaj mi gojis pri ricevota longega letero, sed poste montrigis, ke mi malĝuste komprenis, ĉar temis pri "post kelkaj tagoj", kiam mi ricevis nur kelklinian postkarton. 8. Nur en Ĉeĥoslovakio oni povas audi "ĉikanan muzikon" kaj mangi rostitajn "gastanojn"; en ĉiuj aliaj landoj oni diras: cigana muziko, kastanoj.

FERVOJISTA SEKCIO

Printempa Renkontigo en Praha

EK Praha en kunlaboro kun FS ĈEA kaj FS SEA organizis la ĉi-jaran Printempan Renkontigon "APRIL 1990", kiu okazis 30.3. - 1.4.1990 en Praha. Partoprenis 145 esperantistoj el ambaŭ niaj respublikoj, Aŭstrio, Germana Demokratia Respubliko, Jugoslavio kaj Pollando.

Vendrede la 30-an de marto okazis alveturo, logigo de la partoprenantoj kaj ilia interkonigado kun la urbo kaj partoprenantaj gekolegoj.

Sabate antaŭtagmeze dum seminario en Uzina Klubo Tesla Holešovice "Domovina" oni interŝanĝis spertojn pri laboro kaj agado en siaj E-klubo kaj praktike lernis kelkajn sociajn ludojn.

Dum posttagmeza kultura programo ni aŭskultis recitadon de nia sperta, nemaljuniganta E-aktorino Eva Seemannová, ĝuis solkantadon de Josef Vích el Nacia Teatro en Praha kun muzika akompano de la nevidanta Jiří Vychodil. Ankaŭ magiisto Linhart Rýznar ricevis oftan aplaudon pro sia bonnivela magiista prezentado.

Dum vespera dancbalo kun tombolo oni bone dancis, kantis kaj amuziĝis ĝis noktaj horoj.

Dimanĉe antaŭtagmeze oni en grupoj vizitis kaj konatiĝis kun kelkaj historiaj vidindaĵoj de nia ĉefurbo.

-JT-

Invito al Jarkunveno de FS ĈEA

La ĉi-jara jarkunveno de FS ĈEA okazos en tagoj 28.-30.9.1990 en Staré Splavy apud Doksy, en belega naturo apud Máchovo-lago. Mallonge el la programo:

Vendrede posttagmeze alveno kaj logigo de la partoprenantoj, promenoj en ĉarman ĉirkaŭaĵon. Vespere interkona vespero kun videoprojekciado, babilado, kantado.

Sabate antaŭtagmeze okazos laborkonferenco kaj balotoj. Post komuna tagmango oni ekskursos al Doksy, poste oni navigos en ŝipo sur Máchovo-lago. Vespere amuza programo kun muziko kaj dancado, dispone al interesatoj estos ŝipetoj kaj akvobicikloj.

Dimanĉe antaŭtagmeze okazos promenoj en ĉarman ĉirkaŭaĵon de Máchovo-lago. Post tagmango la jarkonferenco oficiale finiĝos. Provizora partoprenkotizo 250 kronojn. Aligilojn akceptas FS ĈEA, Jilská 10, 110 01 Praha 1.

-JT-

junulara sekcio

33-a Internacia Seminario de GEJ

En tagoj 27.12.1989 - 3.1.1990 en Neumünster (FRG) estis organizita la 33-a Internacia Seminario de GEJ, kies temo estis: Sovetunio. Tium ĉi seminarion partoprenis 327 geesperantistoj el preskaŭ 30 landoj. Ĉefan E-junularon reprezentis kvar delegitoj de Junulara sekcio de ĈEA kaj ok esperantistoj-muzikantoj el Ostrava.

Alveno, logigo kaj tuta akcepto de partoprenantoj estis iom problemigita pro abunda alveno de esperantistoj el Sovetunio kaj el GDR. Por organizo de niaj venontaj arangoj ni devas jam kalkuli kun malfermitaj limoj kaj pli libera vojaĝebleco kaj kun de tio devenanta kvanto de gastoj el iuj landoj.

Dum registriĝo ĉiu partoprenanto de la seminario ricevis materia-lojn rilatantajn al la tuta arango - la programon de prelegoj kaj kunsidoj, planeton de la gastiga urbo, skizitan historion pri federacia lando Slesvig-Holŝtino ktp. Aktuala programo por unuopaj tagoj estis publikigita ankoraŭ pli precize sur la murgazeto. Ĉiu labortago estis dividita je kvar 1 - 1,5horaj blokoj; ofte okazis samtempe du aŭ tri arangoj. La vesperoj estis dediĉitaj al kulturprezentadoj (koncertoj de E-muzikgrupoj, teatraĵo, kultura programo de esperantistoj el Sovetunio). Proksimume duono de partoprenantoj povis ĝui aŭtobusan ekskurson al Lubeck kaj vidi ĝiajn belajn historiajn lokojn kaj memoraĵojn.

Prelegoj kaj interparoloj temis plejparte rekte pri Sovetunio, pri historio de tiu ĉi lando, ĝia kulturo, nuna evoluo (eks. "Pakto Hitler-Stalin", "Geografio de Sovetunio", "Judoj en Sovetunio"), sed ankaŭ la temoj plilarĝiĝis (Ĉeĥoj kaj Sovetunio, "Malperestrojko" en norda Koreio, ĉu germana reunuiĝo? ktp.). Kompreneble estis envicigitaj ankaŭ la ripozprogramoj: kurso de estona kaj rusa lingvoj, esperantaj kantoj el tendaroj de Sovetunio, bazkurso de marionetludo, de slavaj dancoj, kurso de kristnaska kandelo-ornamado ktp. Estis ankaŭ prezentitaj lumbildoj kaj video pri E-arangoj.

Reprezentantoj de nia Junulara sekcio preparis prelegon "Ĉeĥoj kaj Sovetunio" kaj informis ĉiujn pri la novembraj okazaĵoj en nia lando inkluzive projekciadon de videokasedo. La prelego estis kompletigita el niaj presmaterialoj kaj partoprenis ĝin pli ol tridek homoj (samtempe okazis en aliaj ĉambregoj prelegoj pri Hitler-Stalin-Pakto kaj pri lingva situacio en Sovetunio). Esperantistoj el Ostrava prezentis folklor-muzikon el montaro Beskydy.

Krom la oficiala programo estis multaj eblecoj por informi ĉeestantojn pri nia agado dum neoficialaj renkontigoj. Dum revenvojo ni estis kelkajn tagojn gastoj de E-klubo en Hamburgo. Ni partoprenis ilian kunvenon kaj kontribuis al ilia programo.

Jiří Tomeček

Eble ĝi estis felika koincido de cirkonstancoj, ke en la jaro 1949 mi ekpostenis en ONV Třebíč, kie mi prizorgis kultur-sektoron. Jam de pli frue mi konis profesoron Kilian, Jozefon Poláček kaj plurajn aliajn adeptojn de la internacia lingvo en ĉi tiu urbo. Sed la plej pozitiva fakto estis, ke pri Esperanto interesigis pli granda junulara grupo.

Esperantista Klubo havis post sia konstituo konsiderindajn obstaklojn por akiri konvenan klubojn kaj tial nur en la jaro 1953 mi povis vakigi por la Klubo negrandan ejon en Kultur-domo de Bedřich Václavěk.

Sed estis evidente, ke la nura klub-agado ne povas daŭre kontentigi junajn homojn. Baldaŭ post mia alveno al Třebíč venis en mian oficejon la junulo kaj petis permeson arangi Esperanto-kursojn sub la libera ĉielo. Li estis Paulo Sittauer, kiu estas ĝis nun la ĉefa organizanto de ĉiuj SET-oj. Komencoj de la Tendaro estis tre modestaj. Tamen ĉiujare ekipo de la tendaro plibonigis, ĉiam ni acetis kelkajn nenovajn tendojn en la najbaraj tendaroj kaj oni komencis konstrui provizoran kabanon.

Vizitado de la tendaro konstante kreskis kaj tial necesis pli bonaj kondiĉoj por restado de tendaranoj. Sed nur en la jaro 1972 estis konstruita moderna kuirejo, instalita akvokonduko kaj elektra lumigado. Sed mankis la ĉefa funkcia konstruaĵo kaj mangejo. Tial nia Klubo en la jaro 1975 faris kontrakton kun MNV en Lančov pri akumulo de rimedoj en la agado Z, ni petis la Sud-Moravian Nacian Komitaton pri subvencio kaj tial en la jaro 1974 ni sukcesis per monhelpo ĉi tiun konstruaĵon realigi.

Sed tiutempe komencis kadukiĝi la tendoj kaj tial nia Klubo komencis persisti pri konstruo de stabilaj kabanoj. Ankaŭ ĉi tiu intenco realigis en la jaroj 1980-1981 kaj tial nia tendaro povis en la jaro 1987 digne soleni la 35-an datrevenon de sia fondigo.

La organizado de Someraj Esperanto-kursoj ne estas izola afero. La akiradon kaj edukadon de novaj adeptoj ni devas koncepti kiel ĉiufanlikan agadon, dum kiu oni devas eluzi ĉiujn konvenajn formojn de informado, klarigado kaj racia propagando. SET povas doni nur la fundamenton, sur kiu la kluboj devas konstrui firman, laboreman kaj al Esperanto sindonan anaron.

František Sedláček

ONV - Distrikta Nacia Komitato
MNV - Loka Nacia Komitato

Impresoj de eksterlanda tendarano en SET

Du semajnoj, kiujn mi pasigis en Lančov surborde de digolago Vranov apud Znojmo, estis la plej belaj en mia vivo.

Tio estis ne nur malkareco, kiu impresis min, sed ankaŭ bonhumoro...

Lernante kaj vivante kune kun 145 homoj, en aĝo de ok ĝis preskaŭ okdek jaroj, el ses diversaj landoj, mi amuzigis kun ili kaj estis edifata de ilia entuziasmo por Esperanto. Ĉio ĉi estis profunda sperto, ĝi flamiĝis la gekomencantojn per fervoro kaj resargis la bateriojn de la malnovaj tankoj, similaj al mi, obligante ke ili foriru fortigitaj al la pac-fronto.

Kvankam ĉiu serioze partoprenis la lernadon, estis ĝoja kaj malstreĉa etoso. Oni vivis sane, subĉiele en bela cirkuaĵo kun abundaj reciprokaj simpatioj kaj ankaŭ kun abundaj manĝaĵoj kaj eksercado, laŭkion oni deĝiris. Mirige rapide progresis Esperanto-scioj de ĉiuj, ĉefe la miaj, ĉar mi estis la sola angle parolanta homo tie kaj tute mi dependis sole de Esperanto. Mi ĝuis centojn da interesaj interparoloj diversspecaj kun homoj de ses gepatraj lingvoj: ĉeĥoj, rusoj, hungaroj, bulgaroj, germanoj kaj poloj. Ŝajnis al mi, ke ĉiuj estis la samaj, ĉar se oni uzas Esperanton, la nacipeco ne estas frapanta.

Certe mi povas diri, ke mi estis emociigita, ĉar mi estis ege bone akceptita kaj ĉiam mi memoros kun la plej granda plezuro kaj kontento la tri semajnojn, kiujn mi pasigis en Ĉeĥoslovakio, parolante nur Esperanton.

David Curtis,
instruisto el Anglio

Ĉe ĉeĥoslovakaĵo invalidoj

En marto pasis unu jaro, kiam nia kvarmembra delegacio de Tutrusa Asocio de Invalidoj el Novgorod vizitis Ĉeĥoslovakion. La vizito efektivigis laŭ invito de Distrikta Asocio de Invalidoj en Praha 1 kaj BO de korptrafitaĵo rulseĝuloj en Praha.

Motivo de nia dektaga vizito estis: konatiĝi kun laboro de Asocio de Invalidoj kaj reciproke intersangi spertojn. Dum nia vizito mi efektivigis multajn renkontojn kun niaj ĉeĥaj geamikoj. Longe antaŭ la vizito de Ĉeĥoslovakio skribis al mi mia korespondemiko, ĉu mi volas lerni internacian lingvon Esperanto. Mi respondis: jes. Kia surprizo en Praha, kiam mi ricevis donace de miaj amikoj E-lernolibrojn kun deziro disvastigi E-on inter invalidoj en mia regiono.

Post mia reveno hejmen mi aperigis la anoncon "Kiu volas lerni internacian lingvon Esperanto?" en gazetaro. Aligis sep geinvalidoj, lernas kvar. La kialo de nia decido: lerni tiun belan lingvon kaj pere de ĝi trovi amikojn ne nur en Ĉeĥoslovakio, sed en la tuta mondo.

Mi lernas E-on laŭ ĉeĥa E-lernolibro ĉar samtempe mi studas la ĉeĥan lingvon. Ellaboritajn lecionojn mi sendas por korekto al s-ino Malinská. Nuntempe mi finas la unuan parton de la kurso. Por miaj gelnantoj mi tradukas la ĉeĥan E-lernolibron en la rusan kaj tiamaniere mi instruas al ili Esperanton. Mi estas dankema al ing. O. Pechar, Jana Malinská, J. Vaněček kaj al pliaj, kiuj konigis al mi Esperanton.

Esperanto estas nenies lingvo, sed en ĝiaj fundamentoj estas elementoj de diversaj konataj lingvoj. Esperanto ne nur povas, sed devas fariĝi lingvo de la tuta mondo por kunigi naciojn en la nomo de paco kaj felicio por ĉiuj homoj.

Anatolij Smutov,
Novgorod, USSR

Ankoraŭ

ni revenas al la diskuto pri "Abunde - redunde" kaj publikigas almenaŭ fragmente kelkajn kontribuojn, kiujn ni ricevis.

Reago je la "Kontribuo" en la n-ro 2/89-131 en Starto.

Mi esprimas mian profundan maltrankvilon pro la supre citita artikolo. Ĝia tono ne indas altajn tradiciojn de la revuo.

Ne eblas kompari eldonkvanton de ia detektivaĵo kun ia poemaro, en ĉi tiu kazo kun la poemaro Stromy přicházejí do města. Ne eblas preterlasi la fakton, ke la nomo de Jiří Karen troviĝas en la verko "Spisovatelé XX. století" kaj en la granda enciklopedio ekde la jaro 1986.

Esperanto kiel lingvo estas firma kaj alte evoluinta kaj tute ne endanĝerigos ĝin provoj enkonduki kelkdek aŭ pli da novaj terminoj, plejparte ne akcepteblaj kaj ne havantaj sancon enradikiĝi. Ankaŭ en ĉiu nacia lingvo oni povas trovi vortojn kaj formojn sukcesajn aŭ ne sukcesintajn, tio do apartenas al la natura evoluo. Estas eraro ataki kaj kondamni la aŭtorojn, ĉefe, kiel en nia kazo, se temas pri poeto multon farinta el vidpunkto publicista kaj organiza favore al Esperanto. Almenaŭ inter ni esperantistoj regu pli da toleremo kaj komprenemo kaj ni evitadu malaltigadon de meritoj kaj de la farita laboro.

Josef Vondroušek

Pri la leteroj de Jiří Karen kaj Josef Rumler en Starto n-ro 5/89.

Tiujn ĉi du leterojn mi ne povas lasi sen reago. En la unua alineo sur p. 17 J. Karen "citas" miajn vortojn, sed iujn partojn li ellasis. Tiuj tamen ne estas tiom gravaj krom unu frazo. Skribante pri la poemo Stromy přicházejí do města mi aldonis: "... estis eldonita en 830 ekz. Ĉu tio atestas pri famo?" Tiun ĉi demandon J. Karen ellasis. Sur la paĝo 18 estas rimarkindaj aferoj. Mi skribis: "Sur la sama paĝo oni legas pri skemistoj kaj senskrupulaj progresantoj. Tio havas nenium signifon por vicaĵ samideanoj, kiuj satas legi Esperantan poezion. Kiom da ili ekzistas en la mondo?" El tio J. Karen kreaciis: "Kiuj ŝatas legi la esperantan poezion? Kiom da ili ekzistas en la mondo? Se la aŭtoro tion ĉion scias, do povas esti nur lia malico, se li montras mian "senvaloron verkistan", citante la statistikon pri miaj eldonitaj libroj." Fino de la vortoj de J. Karen. Liaj vortoj "senvaloron verkistan" povas pensiĝi leganton, ke temas pri citaĵo el mia teksto. Tio ne ekzistas, la vortojn skribis, inkluzive la citilojn, J. Karen mem. Ĉu tio ne estas malico? Ĉu mi ie taksas la nivelon de liaj poemoj? Kaj pri la vortoj "statistikon pri miaj libroj": Mi skribas pri unusola libro. Ĉu oni povas nomi tion "statistiko"? Mi devas ankaŭ atentigi la leganton, ke ne eblas kompari la cirkonstancojn de la nuntempe alte evoluinta ĉeĥa literaturo kun tia stato, kia ekzistis en 1836, kiam estis eldonita "Máj" de K. H. Mácha. Al la lastaj frazoj pri "malhonorigo" de la poetoj fare de mi, sur p. 19, mi devas atentigi, ke mi skribis kontraŭ la vortoj de Eli Urbanová pri "famaĵ ĉeĥaj poetoj". La tuta teksto de J. Karen konfirmas nur, kian lokon ili ambau okupas nun en la ĉeĥa poezio...

Fine necesas diri, ke J. Rumler svingas per la "Neologisma glosaro" de H. Vatré, sed mi skribis kaj nun ripetas tion, kion diris G. Waringhien: "Nek cedi nek koncedi al la Praga skolo." Plu mi povas citi negativajn starpunktojn pri Abunde kaj redunde, kiujn esprimis konataj (ĉe vere famaj!) Esperantaj aŭtoroj: Aldo de'Giorgi, d-ro Giorgio Silfer, d-ro Bernard Golden, kaj Ervin Fenyvesi en Hungara Vivo 3/89 citas aŭstralianon Trevor Steele, novzelandanon Jozefo Major, kaj mi aldonas ankaŭ Sergej Ovcinnikov en Hungara Vivo 3/88. S-ino Urbanová sendis sian longan traktadon al iu Simpozio en Varsovio en 1988, al Literatura Foiro en Svislando, kaj per siaj vortoj pri "famaĵ ĉeĥaj poetoj" trompis eks-terlandanojn, kiuj scias minimumon pri la nuna nia poezio...

Adolf Staňura

Kara Starto,

Mi subaŭskultas la disputon pri poetoj. De Karen mi surbrete trovas unu-du librojn, pluajn tri mi vidis en slavlingva fakbiblioteko en Londono. Kaj la nomon de J. Rumler mi ĵus rimarkis kiel lastan vorton en la "Nokto kun Hamleto" de Holan (1969, ses mil ekzemplerojn).

Kredu min, do, ambau poetoj ekzistas. Ĉe se poetoj pli ofte preferas diri: "Ho ve, ĉi tro solida karn' degelu, / disfandu sin, dissolvu sin en roson..." (la zamenhofa traduko ĉi-verse tro polve sonas). Pli interesas min, multe pli interesas min, ĉu nacilingva poeto estas nepre ankaŭ en E-o poeto...

Mi trovis la disputon iom tro sensuka, iom mankis ĝuste - poezio! Do mi finas per omago de Meva Maron al Karen, notoj surmargene de "Flugilhava Ŝtono":

"Lumbril' al roko najlis l'urbon / de melongenoj kaj paprik' /
Ni kune plantis penspomarbojn / Fontfunde flavas lumperik' /
Trankviluskato subfenestre / ekfloras - rara pacoplant' - /
dum ombro nin surmure pentras / per franga vitpenik' / Tintanta /
muskatkrepuske font' ...

Rezin' odoras kaj boletoj / Kun papilioj nuptas kres' /
Betulpaper' Vanesbaletoj / Pinligno sub penikkares' /
- sen sel', senskvama ŝvel' - ikonos / kaj pierisa petolem' /
kaperos la pentriston, kronos / silent' en formo de poen' ...

Ĉu vere la vapore ploras / kaj fugas el bolkruc' /
Mirtelo - kiel ĝi parolas / en senarbusta lok' al musk' /
Ĉu gojas, dum ni bergrapolojn / forglutas, la rubusoj? /
Kaj kiel diri en la popla / krepuskon?"

Tio pravas pli ol enciklopedioj, ĉu ne?

Amike.

Kris Long
Bracknell
Britio

Bernard Golden

En artikolo titolita "Pri la malkaŝo de plumnomoj /Budapeŝta Informilo, 1981, julio, n-ro 7, pĝ. 8/ la redakcio kondiĉas kelkajn principojn de redakta moralo rilate la senvualigon de pseŭdonimuloj en Esperantujo. Oni ja devas akcepti la vidpunkton de la redakcio eviti tiun malkaŝon, se ĝi povas okazigi persekutadon, malliberigon aŭ eĉ mortigon. Sed kutime la alpreno de karnomo estas speco de ludo celanta mistifiki la publikon, kaj la publiko rajtas kunludi kun la enigmokreanta aŭtoro por diveni, kiu li estas. Ekzemple, Kolomano Kalocsay klarigis, ke li kreis plurajn pseŭdonimojn, ĉar en Literatura Mondo li verkis multe pli ol oni rajtas.

Efektive, ne estas facile identigi la uzantojn de pseŭdonimoj, ĉar ofte la decifrado bezonas kriptanalizajn teknikojn. La plumnomoj de Kalocsay estas bonaj ekzemploj de la diversaj tipoj. La plej facile decifrebla speco estas la anagrama pseŭdonimo, kiu estas formita per aliviciĝo de la literoj de la originala nomo. Kelkfoje povas okazi ankaŭ fonetikaj modifoj. Alex Kay estas analizebla jene. Oni provu rearangi la ordon de la literoj. La plej promesplena kombinaĵo estas "k-a-l-e-x-a-y". Ĉar "x" estas prononcata kiel "ks", kaj en kelkaj lingvoj "k" kaj "c" havas la saman sonon, oni substituu "cs" al "x"; "k-a-l-e-cs-a-y". Se oni nun anstataŭigas la "e" per "o", la rezulto estas "k-a-l-o-cs-a-y"!

Aliaj pseŭdonimoj de Kalocsay estas pli malfacile decifreblaj. Oni ne devas tro streĝi la cerbon por kompreni, ke C.E.R. Bumy estas modifo de la Esperanta vorto "cerbumi", por ke ĝi havu la aspekton de propra nomo. Sed la analizo haltas tie, ĉar sen pliaj sciigoj, ne estas eble ligi ĝin al Kalocsay. Vortludo kaj traduko karakterizas la kriptonimon Kopar. Supoze, ke ĝi estas Esperanto, oni povas skribi ĝin "koparo". Dismembrigante ĝin oni ricevas "ko" + "paro", t.e. "paro da koj", alivorte "du koj" aŭ "k k". Nun oni provu legi Kopar kiel hungaran vorton: kopár, "kalva, nuda". Sintemante la rezultojn de la du analizoj, oni demandu, kiu estas kalva kaj havas nomon kun la inicialoj K.K.? Kolomano Kalocsay! Okaze de intervjuo en 1972 kun la germana esperantisto Reinhard Haupenthal, Kalocsay ne kontestis, ke Kopar estas unu el liaj pseŭdonimoj.

La plej enigmaj kriptonimoj estas tiuj, kiuj similas al ordinaraĵoj nomoj; ili, do, ne estas analizeblaj per rearango de literoj, traduko aŭ vortluda jonglado. Tiaj nomoj estas Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter. Laŭ la redakcio de Budapeŝta Informilo, oni ne rajtas atribui la nomon Peter Peneter al Kalocsay, ĉar ankoraŭ ne trovigas skriba dokumento atestanta la identigon. Kiam en la menciita intervjuo Kalocsay estis pridemandita, li respondis, ke li konis Peter Peneter, kiu loĝis en Budapeŝto kaj mortis en 1953 sed neis, ke li kaj Peneter estas la sama persono. Li aldonis, ke Georgo Peterido Peneter eble estas Georgo M. Maura /ankaŭ ies pseŭdonimo/. Tiutempe Kalocsay diris, ke li neniam havis rilatojn kun Maura. Tiel statis la afero en 1972. Nun mi deziras prezenti donitaĵojn, kiuj montras, ke finfine estas eble scii, kiuj estas la pseŭdonimuloj,

kies poeziaj verkoj en Esperanto apartenas al la pornografia ĝenro.

Unue, mi provos klarigi la signifon de la voknomoj. Peter estas la formo de la nomo Petro, uzata en kelkaj eŭropaj lingvoj, ekzemple la hungara, germana kaj angla. Peterido estas analizebla kiel "Peter + ido", t.e. "ido aŭ filo de Peter". Tiu ĉi nomo, do, estas patronomo formita same kiel etnolingvaj patronomoj, ekz. la angla Peterson, "filo de Petro". Georgo diferencas de Peter, ĉar ĝi havas la Esperantan formon. Aliflanke, la familia nomo Peneter ne estas uzata en etnolingvoj. Ĝi estas formita surbaze de la egipta nomo de la planedo Venuso, kaj en tiu formo aperas en la romano La Faraono de Boleslaw Prus, konata al esperantistoj per la traduko de Kabe.

Ni nun komparu la eldondatojn de la verkoj de la pseŭdonimuloj, iliajn naskiĝ- kaj mortdatojn, kaj la samajn datojn de du grandfamaj esperantistoj aŭtoroj. La informoj venas de la Librokatalogo de UEA /1980-1982/.

A. Peter Peneter /1891-1953/: Sekretaj sonetoj, 1931
Georgo Peterido Peneter /1931?-?/: La travestiita muzo
/eldonita kune kun Sekretaj sonetoj kaj aliaj amoretaj
poemoj en la kolekto titolita Libro de Amo, 1965/
Georgo E. Maura /1905- /: Duonvoce, 1939 kaj 1963

B. Kolomano Kalocsay /1891-1976/
Gaston Waringhien /1901- /

Rimarku la koincidon inter la naskiĝdatoj de Peter Peneter kaj Kolomano Kalocsay - 1891! Kvankam la naskiĝdatoj de Georgo Peterido Peneter, Georgo E. Maura kaj Gaston Waringhien diferencas inter si, ĉiuj tri - la du pseŭdonimuloj kaj la franca beletristo - ankoraŭ vivas. Estas signifplena ankaŭ, ke la nomoj Georgo kaj Gaston komenciĝas per la sama litero - G.

Surbaze de tiuj ĉi donitaĵoj, oni ne rajtas tiri la konkludon, ke Peter Peneter estas Kolomano Kalocsay, kaj la du Georgoj estas Gaston Waringhien. Ĝis nun ekzistas nur aludoj kaj koincidoj. Skeptikuloj, tamen, povas kontentigi, ĉar lastatempe aperis dokumento. Ĝi estas Plena Analiza Gramatiko de Esperanto /1980/, la kvara eldono de Plena Gramatiko, verkita de Kalocsay kaj Waringhien kaj eldonita la unuan fojon en 1935. Sur la malantaŭa klapo de la polvo-kovrilo estas koncizaj biografiaj notoj pri la kunaŭtoroj. Waringhien "kiel originala poeto /.../ famigis cefe sub la pseŭdonimo Georgo E. Maura /.../" Kalocsay kaj Waringhien "kunlaboris por produkti - pseŭdonime - la erotikan poemaron Libro de Amo /.../" Nun ne estas ombro da dubo pri la identeco de la triopo Peter Peneter, Georgo Peterido Peneter kaj Georgo E. Maura. For la maskojn!

Epilogo: Ekzistas en manuskripta formo ankoraŭ unu erotika verko de Peneter/Kalocsay, La Eksmonahino. En sia intervjuo en 1972 Kalocsay karakterizis ĝin kiel "malgrandan epopeeton" sed diris, ke ĝi ne estos publikigita "ĉar ĝi estas ne nur erotika, sed krome blasfema." Kie estas la manuskripto nun? Ĉu ne estas eble eldoni ĝin kiel postmortan publikigaĵon honore kaj memore al la unua pornografo de Esperanto?

Glosa
kriptanalizo - la teorio kaj metodoj por solvi kriptitaĵojn: la scienco kaj tekniko de decifrado de sekretaj tekstoj.

Bernard GOLDEN, Damjanich u. 1/C, I.8.
H-8200 Veszprém, Hungario

Niaj recenzoj

LITOVIO HODIAŬ. - 1988 - 1 /30/. Eldonejo "Mintis", Vilnius. El la litova lingvo tradukis P. Lukoševičienė, T. Lukoševičius kaj K. Pudenė. 88 p., 20 x 12,5 cm. Prezo 0,40 rubl.

Kajero de revuo, kiu estas eldonata ankaŭ en 4 aliaj lingvoj. Tial ĝi digne reprezentas la malgrandan landon kaj konigas pri pluraj flankoj de ĝia vivo: Pri historio, vivo de kamparanoj, produktado de ŝtofoj, iuj modernaj sciencaj fakoj, laboro de restauristoj de artaj verkoj kaj konstruaĵoj, pri ekspluatado de sukceso, zoologia ĝardeno, infana konkurso de pentraĵoj, kantofesto de lernantoj, festivalo de internacia folkloro, ne mankas rubriko "Rido estas sano" kaj informoj pri esperantista agado en 1987 - sed tiuj okupas bedaŭrinde, nur unu paĝon. Krom ankoraŭ aliaj aferoj, ankaŭ filologoj trovas eseon pri baltaj lingvoj kaj povas legi fragmentojn en la jam longe malaperinta prusa lingvo. Ankaŭ du noveletoj distras leganton. Ie - tie oni trovas lingvajn malglataĵojn, sed tiuj ne tro ĝenas. Oni ne povas konstati gravajn diferencojn en la lingvaĵo, kvankam tri esperantistoj tradukis. En la unua artikolo "Proletara revolucio en 1918-1919 en Litovio" la tradukinto skribas klasikmaniere la datojn, ekz. "11-an de decembro 1917" sen la artikolo, tio kelkfoje ripetigas, sed poste oni trovas ĉiam la artikolon "la" antaŭ la dato, kiel konvenas. Sur p. 25 - 26 oni legas trifoje pri nia urbo Brno, sed ne estas aldonite, en kiu lando ĝi situas, simile estas ĉe pluraj aliaj geografiaj nomoj. Sur p. 76 estas "Praho", do formo nek ĉeĥa nek Esperanta. La libro estas ilustrita per preskaŭ 70 fotoj kaj bildoj, pli ol duono de ili estas koloraj. Precipe belaj estas 14 koloraj pentraĵoj fare de infanoj 5 ĝis 9 jaraĵ.

Mi pensas, ke konvenis aldoni prononcadon de litovaj nomoj. Ĉefoj kaj slovakoĵ scias, kio estas ĉ, ŝ, ž, sed alilingvanoĵ? Krome, ekzistas sufiĉe oftaj du- aŭ triliteraĵ vokalgupoj, kiuj estas diversmaniere prononcataj.

Entute interesa libro pri lando, kie nia movado bone prosperas.

Adolf Staňura

LA ATESTO DE JOZEFO SMITH. Eldonita de Por-Esperanta Mormonaro kun permeso de la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la lastaj tagoj. Beaufays, Belgujo, 1988. - 24 p. 21 x 14 cm. Sen prezindiko.

La broŝuron enkondukas "La Dek-tri Kredartikoloj de la Eklezio..." ktp. - vidu supre. Jozefo Smith naskiĝis en 1805 en la usona ŝtato Vermonto kaj post dek jaroj la familio translokiĝis en la ŝtaton Nov-Jorko. En 1827 li ekzidis. Post establo de la nomita Eklezio li foriris en Ohion kaj en 1844 estis en Carthage, Ilingso, "murdata per kugloj" fare de "armita populaco kun farbitaĵ vizagoj."

La religia kredo estis la ĉefa afero de lia vivo. Kelkfoje li havis viziojn, li vidis ŝvebantaĵn homfigurojn ĉirkaŭitaĵn de lumo,

kaj fine tia figuro informis lin pri la loko, kie li trovas orajn platojn kun religiaĵ tekstoj. Poste li transdonis la platojn al la viziaĵo kaj sen mencio, kiam kaj kiel li ricevis ilin, li rakontas, ke li kopiis la signojn. Kun helpo de alia plato li eĉ tradukis la tekstojn el la egipta lingvo. Aliaj tekstoj estis en la lingvoj kaldea, asiria kaj araba. En 1829 Smith komencis tradukaĵon de la libro de Mormon. Oni legas pri provoj, ke najbaroj volis ŝteli la orajn platojn, oni volis linĉi ties posedanton, sed tiu estis en 1829 kune kun sia amiko "per la manoj de la ĉiela mesaĝanto" konsekrita, baptita kaj nomita "la unua eldoro" /= "starŝi" de la Eklezio. Poste li kun siaj sekvantoj konstruis belan templon proksime de Klevelando en Ohio. Ĉe la fino oni legas, ke Jozefo Smith estas nuntempe akceptata kiel profeto de Dio de milionoj da personoj en centoj /! da landoj.

La lingvaĵo estas kontentiga.

Regantoj de la tuta mondo devus disvastigadi tiun tiel mirakle kreitan religion, ĉar ties 12-a artikolo diras: "Ni kredas je submeto al reĝoj, prezidentoj, registoj kaj juĝistoj; kaj ke ni obeu, honoru kaj subtenu la legon."

Adolf Staňura

Noto: La vorto "eldoro" estas esperantigita la angla vorto "elder".

D-ro Kawakita Jiro /1920/: ENKONDUKO AL PROBLEMSOLVA ORIGINALA KJ-METODO. Esperantigita kaj eldonita de Japana Esperanto-Instituto, 1989. 48 p., form. 21 x 15 cm. Prezo 10,00 gld.

Temas pri inventaĵo de d-ro Kawakita Jiro /kaŭakita ĵirō/, eminanta japana antropologo, profesoro ĉe universitato Tukuba. La literojn KJ prononcu anglamaniere kei-ĝei, kiel atentigas la antaŭparolo. La metodo estis ellaborita unuavice kiel ilo utila en antropologio, por sintezi idiosinkraziajn observojn aŭ krudajn informojn akiritajn per praktika esplorado, por trovi novajn hipotezojn. Sed nun ĝi estas aplikata en Japanio ankaŭ en solvaĵo de problemoj en edukado, komerco kaj industrio. Sur p. 45 la aŭtoro informas, ke ĝi estas registrita ĉe la Japana Patent-Oficejo.

La hodiaŭan homaron alfrontas minaco de memneniigo, neniam antaŭe imagebla. Internaciaj rilatoj estas ekstreme nestabilaj kaj la moderna civilizado troviĝas en granda krizo. Estas necese trovi ian manieron, por krei ordon el la de ni farita kaoso kaj establi daŭran pacon. Ordo venos sole el la interno de la kaoso mem - diras s-ro Kawakita.

Sed kiel komenci? Kiujn procedojn sekvi, por ke malprecizaj informoj memklariĝu sin, kaj kiamaniere sintezi ilin ĝis la ordo? La KJ-Metodo estas unu ebla respondo al tiu nepre plenumenda tasko de nia tempo, opinias s-ro Kawakita. Tial li skribis tiun ĉi verkon kun la espero, ke ĝi atingos vere internacian legataron.

En la j. 1986 estis eldonita 600-paĝa plena lernolibro en la japana lingvo. Tian verkegon traduki en aliajn lingvojn postulas longan tempon. La Japana E-Instituto decidis, unue prezenti skizan enkondukon pri la ĉeftraĵoj, por ricevi reagojn de esperantistoj el diversaj partoj de la mondo. D-ro Kawakita estas fervora subtenanto de Esperanto kaj delonge kaj ofte pledas por nia lingvo ĉe diversaj

publikaj okazoj kaj en gazetaro.

En Japanio multaj entreprenoj, edukaj kaj esploraj institucioj kaj programoj por personara trejnado nun uzadas la KJ-Metodon en mult-nombraj manieroj. Ĝi estas rekonita kiel unu el la plej efikaj kaj rendimentaĵoj por evoluigi organizojn. Ĉe esperantigo kunlaboris s-ro Yosimi Umeda, kies senriproĉan Esperanton povis ekkoni nia samideanaro dum la Festotagoj en Havifov en aŭgusto 1989.

Tion povas la subskribonta recenzanto skribi sur bazo de tekstoj, kiujn la broŝuro enhavas. Mi ne dubas, ke temas pri afero tre bone elpensita kaj ke ĉiu studinto povas surbaze de ĝi solvi komplikaĵajn problemojn.

Adolf Staňura

LIRIKO INTIMA - broŝuro de poemoj - aldono al la gazeto REVUE LA PROGRESO. Brno 1988

Jen belaspekta broŝuro kun poemoj de Jana Čichová kaj aldonitaj poemoj de Miloš Lukáš kaj Ludmila Jevsejva. La kolekton kompilis Růžena Vlková, ilustris Jiří Schāfer. Bedaŭrinde en la kolofono estas eraro, ĉar la poemojn Jana Čichová ne tradukis, sed originale verkis.

Anstataŭ prilaudi la poemojn, mi prezentas ĉi tie kelkajn specimenojn, por ke legantoj povu ĝui mem.

KULPIGO

Herd-vundinte mian lipon flamo
pense estas vi ĉe la Alia.

Nur kolero estas ĉio! Ame
apartenas ne al mi - la flamo via!

KAKTO

Ĉu la kakto havas ĉarmon
sentigante sian ĉarmon,
se homa mano tusus
ĝian belon. Ĉi forpuŝus
sevoleman atakanton,
ĵete pretigante ganton.

Ĉu la kakto bele floras
ĉu ĝi ne tuŝas pretas, volas
kontentigi ĉiujn same,
ĉiujn priregali me.
Same kiel kakta dorno
estas la virina normo:

piki akradorne - vorte
tiun, kiu strebus forte
per delogo vanta fusi,
same kiel krude tusi
ĉarmon, puron, koron sian,
nur al UNU destinitan.

LINGVA ANGULO

For la paronimisman!

Antaŭ pluraj jardekoj Lanti, la fondinto de la sennacieca movado, lanĉis la batalkrion "For la neŭtralismon!" Por enkonduki la temon de tiu ĉi artikolo, mia militkrio estas "For la paronimisman!"

Kio estas paronimismo? Ĉu nova politika teorio aŭ religia doktrino? Ĉu eble stato de toksigo laŭ la klarigo de unu el la signifoj de la sufikso "-ism" en Plena Ilustrita Vortaro /PIV/? Nu, oni alproksimiĝas. Paronimo estas difinita kiel "vorto preskaŭ samsona kiel alia, sed sence malsama /ekz. pesi-pezi/." Estas citinda la ekzemplo-frazo sekvanta la difinon en PIV: "en Esperanto la paronimoj estas principe evitindaj, krom se iliaj sencoj estas tre malsamaj." La longa, sed nekompleta, listo de paronimoj en la libro Esperantonimoj de Marinko Ĉivoje povas konvinki eĉ la plej dubeman skeptikulon, ke la paronimismo jam grave infektas Esperanton. Jen kelkaj simplaj ekzemploj.

gajno	kazo	lamo	muŝo	pledo	roso	ŝtalo	polvo
gajno	kazeo	lamao	muŝo	pleto	rozo	ŝtalo	pulvo

La signifoj en ĉiu vortparo estas tre malsamaj, tamen eĉ en kunteksto oni povas kelkfoje miskomprenigi leganton, se oni ne uzas la gustan vorton. Ekzemple: "Muŝoj mangis la restaĵojn de la tagmango sur la tablo." Se oni senĉapeligas la "s" en la subjekto de la frazo kaj skribas aŭ diras "muŝoj", la frazo estas ankore ŝenĉava, sed la signifo ŝanĝiĝas.

Jen kelkaj ekzemploj de misuzo de paronimoj, kiujn mi ĉerpis el antaŭ nelonge publikigitaj tekstoj.

1. Fronto/frunto

Tiaj kontrolitaj libroj ricevas sur la fruntpaĝo la indikon "KONTROLITA DE EVA". /Heroldo de Esperanto/
"Fruntpaĝo" estas erara, ĉar "frunto" estas anatomia termino, signifanta la superokulan parton de la vizago inter la tempioj. La antaŭa parto de objekto kiel libro aŭ revuo estas "fronto".

2. Pensio/pensiono

La prezoj inkluzivas plenan pension en Ĉinio
/Heroldo de Esperanto/

La kunteksto temas pri vojaĝkostoj por partoprenantoj en karavano, kiun oni organizis por la Universala Kongreso en Pekino. La uzo de la vorto "pensio" estas sensencaĵo, ĉar neniu vojaĝ-agentejo povas arangi emeritigon de siaj klientoj en kongreslando. "Pensio" estas monsumo, kiun laborinta persono ricevas regule anstataŭ salajro, kiam li atingas difinitan aĝon, devigantan lin ĉesi labori. La gusta vorto, kiu estas bezonata en la kunteksto, estas "pensiono", kiu estas arango en domo aŭ hotelo por pagi inkluzivan prezon por lagado kaj mangado.

3. Oferti/oferti

Por fremdaj studentoj okupataj de Koreaj studoj, KEF /Korea Esplora Fonduso/ ofertas unu monatan programon dum somero en kiu 9 specialaj lekejoj oferiĝas por subjektoj, kiuj inkluzivas korean lingvon, historion. /La Espero el Koreujo/

La intermiksado de la du paronimoj "oferi/oferti" estas tre ofta en ĉiuj partoj de Esperantujo. La baza signifo de "oferi" estas fordoni ion valoran, por akiri ion, kion oni rigardas kiel pli valoran aŭ por servi aŭ utili al io aŭ iu. La sekvaj ekzemploj ilustras, kiel "oferi" estu uzata.

- Mi esperas, ke ili oferos siajn personajn gustojn kaj opiniojn pro la bono de nia afero. /Zamenhof/
- Al la afero, kiun mi nun proponas al la publiko, mi oferis miajn plej bonajn jarojn. /Zamenhof/
- La lernado de kiu ajn nacia lingvo postulas grandajn oferojn de tempo kaj mono. /Zamenhof/

En la citaĵo, KEF ne oferas, t.e. fordonas, programon, kaj lekcion ne oferigas, alivorte fordonigas. La koncerna institucio prezentas aŭ proponas la programon kaj lekcion al frendaj studentoj, interesiĝantaj pri koreaj studoj. Oni povas uzi ankaŭ la vorton "oferti", kies baza signifo rilatas al la komerco: "proponi /varon/ al kliento". Estas eble plivastigi tiun signifon, se oni rigardas la menciitajn programon kaj lekcion kiel specojn de intelektaj varoj, kiujn povas ricevi studemuloj rolantaj kiel klientoj de la institucio.

La celo de tiu ĉi artikolo estas montri, kiel paronimoj kaŭzas malfacilaĵojn ne nur por la lernado de Esperanto sed ankaŭ por ties klara kaj neambigua uzado. Estas substrekeno, ke la cititajn erarojn ne faris komencantoj aŭ lernantoj sed spertaj kaj bone konataj esperantistoj. Krome, eĉ la korektistoj kaj redaktoroj de la periodaĵoj ne sukcesis senerarigi la tekstojn antaŭ publikigo.

Verkantoj de lernolibroj, kompilantoj de vortaroj kaj instruantoj de Esperanto devas dediĉi apartan atenton al la gusta uzo de paronimoj. Se tio ne okazos, estas antaŭvideble, ke dum la dua jarcento de Esperanto, la samaj eraroj kiel tiuj pritrakitaj ĉi-supre makulos publikigaĵojn, kaj ne estos eble daŭre akuzi la povran pre-sejan koboldon pri ĉiuj eraroj.

La plago de paronimoj en Esperanto neniam tute formalaperos, krom se oni forigos tiujn leksikajn elementojn de la lingvo. Tio estas apenaŭ ebla rilate tiujn paronimojn, kiuj estas Fundamentaj aŭ oficialigitaj. Eble oni povas anstataŭigi kelkajn membrojn de paronimaj grupoj per novaj morfemoj, kiel faris Ido. Jen ekzemplo, kiu montras, kiel estis eliminata la konfuzo inter "oferi/oferti". En Ido "oferi" = sakrifiki kaj "oferti" = ofrari. Mi proponas, do, ke en la estonteco oni provu eviti la enkondukon de novaj paronimoj. La devizo de esperantologoj kaj leksikografoj estu: "For la paronimisman!"

Bernard Golden
Damjanich u. 1/C, I. 8.
H-8200 Veszprém
Hungario

Inkludi, ekskludi

En STARTO /1988, 3, 18-19/ mi tuŝetis la problemon, ke la vort-trezoro de Esperanto ne ĉiam funkcias kontentige en la sfero komunuza. Temas plej ofte pri nomado de objektoj, kiuj ĉirkaŭigas nin en la vivo ĉiutage. Tamen, foje ni sentas mankon de taŭga vorto eĉ por plej banala rilato.

Ekz., por "ion fermi en si" /metafore: "ion klare esprimi en si"/ troviĝas en PIV du transitivaj verboj: "inkludi" devenanta el la latina includere kaj "inkluzivi" derivita de l' adjektivo "inkluziva" /latine: inclusivus/. Nu, pri la transitiveco de la dua verbo, ni aŭdacas dubi, ĉar - normale - la senpera verbigo de adjektivo liveras verbon netransitivajn /PAG, 1980, 402/. Do, se iu nepre insistus pri koncern-senca derivaĵo, tiu devus apliki la tre pezmon-van "inkluzivigi".

Sendube, la verbo "inkludi" estas pli praktika, pro siaj sim-pleco kaj belsoneco, sekve ankaŭ pro sia kapableco formi kunmetaĵojn kaj derivaĵojn pli elegantaj.

Kiel antonimon de "inkludi", PIV registras "ekskludi" kaj "ekskluzivi" = "eksterlasi kiel neakordigeblaĵon". Pri la dua verbo validas precize la samo, kion ni diris antaŭe. Sufiĉas aldoni gravan argumenton: Mankas zamenhofaj ekzemploj por "inkluzivi" kaj "ekskluzivi" konforme al la transitivaj difinoj en PIV. Male, disponeblas tie la zamenhofa ekzemplo faktitiva: "donu al ni ekskluzivigan de-cidon".

Evidente, la lingvosento de nia Majstro ne permesis derivi de la koncernaj adjektivoj transitivajn verbojn sen uzi la sufikson "-ig-". Kvankam do, la supre citita adjektivo "ekskluziviga" povus fariĝi modelo por lanci la tro pezajn verbojn "inkluzivigi" kaj "ekskluzivigi", restas nenio, ol ripeti, ke la lingva praktiko perspektive preferos la pli elegantajn "inkludi" kaj "ekskludi".

Tamen, okaze de "ekskludi", ni iomete haltu, memorante, ke iuj eksperimentemuloj inklinas al senbrida dishakado de integraj Espe-ranto-radikoj. Ekz. Piĉ /1984/ inventis la radikon "klud-", kiu permesas al li la konsekvenca prefiksitaĵojn verbojn "enkludi" kaj "elkludi". Sed tiel ĵongle elvoki novan nocion por meĥanike akirita radik-torso "klud-", ĵen estas procedo krude perfortanta internacie stabilajn semantemojn.

En tiu ĉi kunteksto ni facile komprenas, kial Albault propo-nis "eskludi" anstataŭ "ekskludi": por elimini la prefiksen inter-preton de "eks-". Lia propono organike ligas sin al la laŭfundamen-taj "escepti, eskapi, esplori, esprimi, establi, estingi", kie Zamenhof rezignis pri la latineska pseudoprefikso "eks-", rifugante al la italeska "es-" /ekz. esplorare, esprimere, estinguere k.a./.

Por esti tute objektivaj, ni listigu ankaŭ kelkon da zamenhofaj verboj kun la pseŭdoprefikso "eks-": eksciti, ekspedi, eksplodi, ekstermi. /Parenteze, nia Majstro foje elektis eĉ la franceskan "e-": etendi, france: étendre, itale: estendere, latine: extendere. De tiu, laŭ sia senco, prave divergas la latineska PIV-aĵo "ekstensi". / Finfine, pro pluraj motivoj, Esperanto apogu sin ne sole sur latino...

Ni fermu la leksikologian mediton per mia propra prefero: Ĉar el la du antonimoj, sole unu /ekskludi/ per sia pseŭdoprefikso tentas al identigo kun la vera Esperanto-prefikso, mi - de post multaj jaroj - konsekvence aplikas la italeskan solvon de Albault /eskludi/.

Rezultas grotesko: Pluraj redaktoroj de miaj manuskriptoj opiniis, ke temis pri simpla tajperaro kaj korektis mian "eskludi" al la PIVA "ekskludi"! Pro tio, nun mi povus esti suspektata, ke mi voĉdonas laŭ momenta bonhumoro, jen por "eks-", jen por "es-".

La vivo de neesperantisto estas senkompare pli facila ...
J.Kavka

Ĉu ŝarkoj en Prago?

Jes, vi povus ilin renkonti plurloke sur la teritorio de nia metropolo, ekz. en ĝia okcidenta ekstremo, t.e. sur Blanka monto /Bílá hora/. Nu, timi vi bezonas nenial: ili naĝadis predante en la suprakretaĉea maro /proksimume antaŭ 80 milionoj da jaroj/, do interesas nun ĉefe paleontologojn. Sed ne la prasarkoj farigu temo de mia artikoleto ...

En 1969, prof. Stjep-Bowitz, d-ro Zázvorka kaj mi faris ekskurseton al iom pli norda najbaraĵo de Blanka monto, nome al la kanjono de Šárka. Kiam mi klarigis al nia norvega amiko, ke Šárka estis junulino el la boĥemia mitologio, li tuĵ esprimis sin tre sincere: "Nu, Šárka apenaŭ estas tre taŭga nomo por bela junulino!"

De post tiu ĉi interparolo, mia menso de tempo al tempo revenadis al la toponomastika problemeto. Ĝin mi perceptis ĝena: Kun mia filino, denaska esperantistino, mi vizitadis la kanjonon, kiu proksimas al mia loĝejo. La samo ripetigadis - post la kvarona jarcento - kun mia nepo kaj, tute freŝdate, ankaŭ kun mia nepineto eĉ ne dujara. Kiel mi klarigu al ili, ke "Sovaĝa Šarko" /Divoká Šárka/ havas nenion komunan kun la homvoraĵ fiŝegoj?

Evidente, restas al mi nenio alia, ol entrepreni seriozan etimologian analizon, pro kiu vi riskos tediĝi:

1. Antaŭ ĉio, necesas konscii, ke la ĝis hodiaŭ ŝatata virinnomo Šárka estas fakte hipokoristika /familiare karesnoma/ formo. En la ĉeĥa lingvo, la ingenra sufikso -ka funkcias ne sole kiel diminutiva, sed ankaŭ hipokoristika: Helena /= Heleno/, Helenka /= Helenjo/ servu kiel unusola el multaj ekzemploj.
2. Do, se ni forigas la hipokoristikan sufikson, restas la origina nomo Šára. Ĝian antaŭslavan fundamenton ni trovas ekz. en la hispana sierra kaj en la korsika sarra, signifantaj la nocion

de "monta kresto". Tiam morfologie elstarantan kreston prezentas nialoke la duraj rokaĵoj konsistantaj ĉefe el etgrajna kvarco. Ili estigis surfunde de la proterozoika maro /antaŭ jarmiliardo/ el sennombra opala skeletaro de radiolarioj /protozoj/. Laŭ la roka kresto kaj laŭ la en ĝi eroziita kanjono transiris la nomo al la mitologia junulino, kies malfeliĉan sorton mi ne intencas priskribi. Ĝi estas al la ĉeĥoj tre bone konata, interalie pro la melodiraĉa opero fare de Z. Fibich.

3. Ni revenu al la nocio de la monta kresto. Eble la etimologoj ne eraros, se ili atentigos, ke ŝár /slovake ŝiar/ povus koneksi kun la kresto. Temas pri vico de pajlofaskoj aŭ ŝindoj sur tegmento, kiu mem ja similas al kresto. Komparendaĵ estas ankaŭ la germana Schar, la poldialekta ŝzar, la hungara sor kaj eble pliaj etimologiaj parencaĵoj.

Rezulte mi aŭdacas proponi jenajn Esperanto-ekvivalentojn:
-- por la virina nomo Šárka: Šaro, familiare Ŝanjo,
-- por la loknomo Divoká Šárka: Sovaĝa Šaro,
-- por Šárecký potok: Šara roĵo,
-- por la loknomo Tichá Šárka: Milda Šaro,
-- por Šárecké údolí: šara valo,
-- por šárecký kanon: šara kanjono,
-- por šárecké vrstvy: šara tavolaro /en la barandia ordovicio/,
-- por šárecké břidlice: šaraj ardezoj.

Nun povas ĝermi dubo, ĉu mi sukcesis plej trafe solvi la problemon, kiel estu eliminataj la ŝarkoj el tie, kie ili nepre ne havas vivorajton. Tamen senduba restas la fakto, ke Esperanto bezonas disponi pri siaj asimilitaj formoj por ĉiu koncerna onomastikaĵo, ĉu antaŭnoma, ĉu loknoma, ĉu geologia.

Josef Kavka

Al la spontana rondo loko, antaŭ la statuaro de S-ta Venceslao en Prago, honore kaj rememore al la perflame sinmortigintaj studentoj Palach kaj Zajíc kaj al la ceteraj viktimoj de la falinta reĝimo, rondo ĉiam plena de freŝaj floroj kaj brulantaj kandeloj, post la 17-a de novembro 1989 venas ankaŭ multaj alilandanoj, almetas floreteton, kandelon aŭ pecon da papero kun sia salutmesaĝo.
Jen unu mesaĝo skribita en la angla lingvo:

NI ESTAS PROFUNDE TUŝITAJ
DE LA HERCO NE PERFORTA REVOLUCIO
GVIDATA DE BRAVAJ STUDENTOJ JUNAJ
KANDELOJ BRULANTAJ FLOROJ FLORANTAJ
NIAJ MENSJOJ ESTAS JUNAJ
JUNAJ KAJ SERENAJ
NOVAN PAŬON TURNANTA
NOVAN SUPRENIGARDON LEVANTA
JEN LA NOVEMBRO NOKTO DE LA DEKHEPA
ŜILDOJ ESTAS SVINGATAJ
KASKOJ KOLERANTAJ
SED NI ĈIUJ STARAS KVINTAJ KAJ BRAVAJ
OĤ, MIZERA POLICO,
NE EĤU BATALON
KONTRAŬ LA FLOROJN
KIUN NI TEMAS

Via amiko
el Finnlando

(Trad. J.M.
1990-03-05)

loka vivo

Ĉeĥá Třebová E-rondeto "Amikeco" en Ĉeĥá Třebová solenigis la 1-an kaj 2-an de septembro 1990 sian 30-an datrevenon de fondigo. La unuan tagon malfermiĝis ekspozicio pri Esperanto. Vi tie povas vidi kolektojn de aŭtomobiletoj, pupetojn en naciaj kostumoj, kalendaretojn, ankaŭ E-librojn, kalendaretojn, diversajn bildkartojn kaj donacetojn de eksterlandaj amikoj. Filatelistoj vidos belege aŭfrankitajn kovertojn. Ĉiuj estos bonvenaj.

Haviřov La leŭo de febr. okazis jarkunveno. Unue estis projekciita videokasedo pri la festo de 20-jarigo de nia Asocio en aŭgusto 1969. La filmo faris laboruloj de nia Kulturdomo Petr Gomola kaj Milan Bača, parole komentis prez. de nia klubo Zdeněk Heiser. Unue oni vidas kaj audas la plej malproksiman gaston, s-ron Yosimi Umeda, komitatano de UEA. Tre sukcesa afero, propagandanta nian movadon kaj urbon. Poste s-ano Milošlav Pastrňák tralegis laŭdajn leterojn, ricevitajn de partoprenintoj de la aŭgustaj festotagoj. Korajn dankojn al ĉiuj, kiuj skribis al ni! Sekvis informoj pri agado en la pasinta jaro, pri financa stato, pri plano por la krunta jaro, kaj estis aprobita la ĝisnuna komitato kun unusola ŝanĝo: s-ano Bedřich Grym transprenis la funkcion de kasiisto. S-ano Jarmila Pastrňáková ekspoziciis belajn Kristnaskajn-novjarajn bondesirojn el multaj landoj. La kunvenon ĉeestis prezidento de la Pasa sekcio s-ano Drahomír Kočvara, kiu informis pri agado de tiu sekcio kaj esprimis simpatian opinion pri funkciado de nia klubo. - La 22-an de febr. rakontis Jarmila Pastrňáková pri la dua parto de sia libertempo, pasigita en Meksiko, estis projekciitaj belaj diapositivaj kaj ekspoziciitaj bildkartoj kaj prospektoj pri tiu lando. Prof. Mil. Pastrňák informis la ĉeestantojn pri enhavo de la bulteno de ĈEA. Prezidento Zdeněk Heiser aŭdis Esperantajn kantojn de la grupo TEAM, kiu ricevis la titolon "Ora najtingalo" en ĉe. tutŝtata konkurso 1989. - La 15-an de marto ni dediĉis vesperon al niaj samideaninoj, kiuj festis la Internacian virinan tagon. Poste interese rakontis kaj vidigis diapositivajn s-ano Jiří Holan pri siaj libertempoj, kiam li visitis la kastelon Helfštýn, regionon de Pálava kaj ankaŭ projekciis lum-bildojn pri la plej granda ŝargaviadilo de la mondo, la sovetian Ruslan, kiu restadis en Ostrava en majo 1988. - La 26-an de aprilo visitis nian rondeton s-anoj Ludvík Chytil el Přerov kaj Gustav Gajdšica el Třinec. Ili rakontis pri sia partopreno ĉe la 74-a Universala Kongreso de Esp-o en la brita Brighton pasintjare. S-ano Chytil projekciis diapositivajn, s-ano Gajdšica filmon. Ili travivis belajn tagojn inter multnacia samideanaro. - La urba biblioteko en Haviřov transprenos E-ajn librojn kaj propagandos nian lingvon laŭ interkonsento kun nia prezidento Zdeněk Heiser. ASt.

Liberec La 16-an de decembro 1989 okazis jarkunveno de la E-Klubo en Liberec. Oni konstatis abundan aktivecon de klubanoj, i.a. organizon de kumerdiga konferenco de EK en la orienta parto de la Nordbohemia regiono: Liberec, Jablonec n/H, Ĉeĥá Lípa, Nový Bor kaj solenan inaŭguron de nova kurso de Esperanto (en oktobro), regulan eldonadon de kluba bulteno "Liberec-aj Ĉeamikoj", regulan partoprenon de reprezentanto de la klubo en kunvenoj de estraro de Parko de Kulturo kaj Nacia Fronto. Oni preparas fondon de mastruma arango, fondon de pedagogia sekcio de la klubo, ellaboron de edukistemo por instruistoj pere de ĈK ĈEA kaj ministerio de lernejoj, junularo kaj korpedukado de ĈR ktp. En nova komitato de la klubo estas: L. Holeček (prezidento), J. Hanousek (viceprezidento), B. Gräperová (sekretarino), B. Háva (kasiisto), L. Zimová (mastrumantino), L. Spína (kultur-referento), D. Jurásková kaj J. Kocanda (komitatanoj), F. Wallach (laboro kun junularo), Ing. F. Holeček, E. Wallachová kaj J. Brabcová (revisia komisiono).

Mladá Boleslav La interes-rondeto de Esperanto ĉe Domo de Kulturo en Mladá Boleslav laboras ekde januaro 1989. La rondeton gvidas Roman Heřman, ofte visitas ĝin D-ro Hradil en Mnichovo Hradiště. La rondeto laboras en moderna konstruaĵo

de la Domo de Kulturo (apude).
La foton faris R. Heřman.



Olomouc Ĝeneralaj kunvenoj en Olomouc depost la jaro 1945 ĉiujare pravas daŭran viglan laboron de Esperantista rondeto de Parko de Kulturo kaj ripozo en Olomouc. La klubo kunvenadas seninterrompe ĉiusemajne. Kurso por komencantoj ĉiujare. La nunjara ĝenerala kunveno menciis multajn malfacilaĵojn kun ŝanĝoj de kluboj kaj lernejoj. Venis gastoj el Sovetunio, Norvegio, Usono k.a. Kontaktoj kun najbaraj kluboj kaj eksterlandaj gemelkluboj daŭras.

Plej grava okazintaĵo de la ĝ. k. estis nomigo de s-ano JUDr. Vladimír MOHAPL kiel honora prezidento de la rondeto. La klubo havas 99 membrojn. La akceptita plano promesas daŭran prosperplanan laboron en subteno de Urba Nacia Komitato kaj pluaĵ oficialuloj.

La 15-an de marto 1990 akceptis nova urbestro de Olomouc s-ro B. Baran reprezentantojn de la loka Esperanto-klubo. Dum traktado li esprimis konsenton kun la propono, ke en ĉiuj informpublikaĵoj pri Olomouc eldonataj kun fremdlingvaj tekstoj estu uzata ankaŭ Esperanto kaj ke oni preparu eldonon de targa Esperantlingva publikaĵo pri memorindaĵoj de Olomouc, pri kiuj montrigas ĉiam kreskanta intereso inter eksterlandaj turistoj. Priparolita estis ankaŭ kunlaboro de esperantistoj en efektivigado de kontaktoj kun la gemelurbo Tampere en Finnlando. Blažek

Stráňnice Loka Esperanto-klubo SKP "Stráňniĉan" en Stráňnice, kunlaboro kun E-sekcio ĉe Asocio de ĉeĥoslovakaj filatelistoj kaj Sekcio de esperantaj kolektantoj ĉe ĈEA, organizis dum tagoj 2a-4a de marto 1990 en Stráňnice pluan arangon por E-filatelistoj kaj esperantaj kolektantoj. Dum la arangaĵo oni inter alie interkonsentis je komunaj "paŝoj" por plifortigi kunlaboron kun similaj eksterlandaj organizaĵoj. Plue oni ankaŭ preparis renovigon de la Kontrakto pri reciproka kunlaboro inter ĈEA kaj ACF - Asocio de ĉeĥaj filatelistoj. En la programo de la arangaĵo restis ankaŭ tempo por reciproka intersanĝado de esperantaĵoj, kolektad-spertoj ktp.

Plua, simila arangaĵo okazos aŭtune 1991 en urbeto Valtice, distr. Břeclav. -vlha-

Vítkovice La klubo havas kunvenojn ĉiutage inter la 18.30 kaj 21.00 h en Societa Domo en Paco-placo en Ostrava-Vítkovice, kun riĉa programo. Krome oni aranĝas semajnfinajn ekkursojn, eks. la 12-an de majo komuna visito de soĉ-gardeno en Ostrava, la 26-an de majo ekkurso kun rostando de kolbasoj kaj ovaĵoj, la 17-an de junio 1990 ekkurso al monto Ĉantorio, la tradicia kunveno de ĉeĥaj kaj polaj esperantistoj. - La 18-an de aprilo la klubon visitis s-ro Pho el Bankoko. Li estas laboranto de vojaĝoficejo kaj al la klubanoj li konatigis kaj sian trans-eŭropan vojaĝon, kaj sian patrujon, en kiu liaj gepatroj venis el Ĉinio. (Kluba Vivo)

JUDr. Vladimír Mohapl - honora prezidanto de Esperanto-klubo en Olomouc

En la nunjara ĝenerala kunveno de la Esperantista rondeto de Parko de kulturo kaj ripozo en Olomouc oni atribuis titolon "Honora Prezidanto" al la longjara kluba prezidanto s-ano D-ro Vladimír Mohapl.

Li esperantistigis antaŭ la dua mondmilito. Kiel studento de la universitato en Brno li estis enkarcerigita en la jaroj 1940-42. Finstundinte li ricevis respondencan postenon de prokuroro. Jam en la jaro 1946 li farigis Kluba Prezidanto kaj kun interrompo de 9 jaroj 1973-82, li funkcias jam 34 jarojn en periodoj favoraj kaj malfavoraj, ĉiam honeste, tutan liberan tempon li oferas al sia ŝatata Esperanto. Liaj meritoj estas tiom multflankaj, ke ne estas eble elkalkuli ĉiujn, kaj li vere apartenas inter la plej meritplenajn samideanojn de la olomouca kluba historio. Dum ĉiuj jaroj modesta, li scias ĉiujn siajn meritojn prisilenti, tiel ke ĝis nun ne estis ebla iu rekono, nur nun, kiam li atingis 70 jarojn. Lia persona vervo promesas pluajn sukcesojn en venontaj jaroj.

Gratulon kaj dankon!

Aperas Interlingue.

La distrikta gazeto Karvinské noviny aperigis la 3-an de marto favoran artikolon de A. Stanura pri Esp-o reage al informo, ke en Karviná estas organizata kurso de Interlingue, lingvo laŭdire necesa por la preparata "Europa komuna domo". La kursgvidantino respondis ne tro konvinkte, en la sama gazeto, pri avantaĝoj de Interlingue kompare kun Esp-o. Kiel konate, Interlingue estas iama Occidental, sed malgraŭ ŝanĝo de la nomo ĝi ne disvastigas en la mondo, kiel ĝiaj adeptoj dezirus. La autorino kritikis Esp-on kaj i. a. ripročas la saĝnan "nenaturecon" de afiksoj. Iam ŝi estas Interlingue la plej disvastiginta post Esp-o, sed kia estas la diferenco en la disvastigo? Ĉu iu povas tion klarigi? ASt.

Sukcesa anonceto.

En Starto 1/90 aperis anonceto de s-ro Jack Gray, Gillingham, Britio, ke li serĉas korespondamikojn por 30 geknaboj. Li ricevis 50 proponojn kaj gratulojn el nia lando. Urba gazeto Chatham Standard publikis pri tio longan artikolon, favoran por Esp-o. S-ro Gray estas preskaŭ senkonsila pro tiu inundo de leteroj, kiu lin tre agrable surprizis kaj mirigis. ASt.

Ĉeĥoslovaka Pac-Unio ekfunkciis.

En januaro 1990 estis fondita Ĉs. Pac-Unio, kiel nova pintorgano de la ĉeĥoslovaka pac-movado. En ĉefparolado de s-ino Dana Braunová estis

menciita la internacia aktiveco de la Pac-Unio kaj estis dirite: "Bonaj kontaktoj kun unuopaj organizaĵoj en la pasinteco estus kreskontaj al kontaktoj kun iliaj internaciaj centroj. Temas ekz. pri Internacia Pac-Buroo, Internacio de Militrifuzantoj kaj aliaj, kies iuj konkretaj projektoj povus esti por ni interesaj. Tradiciaj partneroj estas la eŭropaj aŭ tutmondaj federalistoj, esperantistoj, religiaj organizaĵoj kiel Pax Christi aŭ Kvakeroj." (Mír, 1/90)

Kristana Sekcio de Esperantistoj - denove renovigata.

Ĉeĥa Esperanto-Asocio denove renovigis la sekcion de kristanaj esperantistoj (KKLI). Tiu ĉi sekcio, simile kiel katolika sekcio, estis antaŭ multaj jaroj likvidita. Do, nun temas pri la reĝustigo de la iama deformacio. Ni alvokas ĉiujn kristanajn esperantistojn de nekatolika konfeso, ke ili aligu ĉe la sekretario, s-ano J. Šperling, Heydukova ul. 11, 180 00 Praha 8, kiu sendos aligilon. Kiel prezidanto denove estis elektita la emerita profesoro de Hus-fakultato D-ro Rudolf Horáský.

La inaŭguro de la agado de KKLI okazis per solena koncerto la 3-an de junio je la 14.30 h en la preĝejo de Ĉeĥoslovaka-humana eklezio en Praha 4 - Spořilov. Šperling

Partoprenu la III-an Verdan Ŝak-Olimpikon.

La sekcio de ŝako de ĈEA kunlabore kun Esperanta Ŝak-Ligo Internacia aranĝas la Trian Verdan Ŝak-Olimpikon de la 5-a ĝis la 14-a de julio 1991 en Poděbrady, Ĉeĥoslovakio.

Oni ludos en tri grupoj: en la grupo A estos landaj teamoj, en B landaj B-teamoj, urbaj kaj klubaj teamoj, en C junularaj teamoj. Oni ludos laŭ sistemo FIDE. Krome estos simultana seanco de ĉeĥoslovaka FIDE-majstre. Oni povos prezenti partion kun vivaj sakfiguroj.

La olimpikon povas partopreni ne nur la ludantoj, sed ankaŭ neludantaj edzinoj kaj favorantoj de Esperanto. Oni loĝos en hoteloj, studentaj hejmoj aŭ turismaj tranoktejoj. Krom la ŝakludado okazos danovespero, aŭdacia kultura vespero, aŭtobusaj ekskursoj por Praha kaj Ĉeĥa Paradizo, ekskurso per motorsipo al Oseček. La venkintoj ricevos premiojn, la ceteraj partoprenantoj diplomojn. Kotizo por grupo A estas 150 Kčs, por B 125 Kčs kaj C 100 Kčs por ĉiu teamano, por ĉiuj aliaj unuopuloj 80 Kčs.

Ĉiujn informojn pri la III-a Verda Ŝak-Olimpiko sendos al interesoiloj ties ĉeforganizanto Ladislav Fiala, Fügnerova 18, CS 290 01 Poděbrady, Ĉeĥoslovakio.

IKBE en Sarajevo.

La 58-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazis en Sarajevo (Jugoslavio) de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1990. Ĝia ĉefa temo estis "Specifeco kaj problemoj komunikaj de vidhandikapuloj". Pri la ĉeftemo, kadre de la kongresa semajno, okazis aparta simpozio, krome okazis pliaj prelegoj pri la E-kulturo, E-movado en la Tria mondo, teatra kaj jugoslavia vesperoj, ekskursoj ktp.

Post la kongreso de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 1990 okazis oficiala Postkongresa semajno en ripozejo de la Blindulasocio en Orebić ĉe

Adriatika marbordo. La programo entenis ĉemaran ripozon, vesperajn prelegojn, koncertojn kaj ekskursojn.

Ĉeĥa delegacio en Jugoslavio.

Kadre de oficiala interŝtata kultur-eduka kunlaboro, trimembra delegacio de Ĉeĥa E-Asocio, sub gvido de prezidanto Petr Chrdle, vizitis E-Ligon de Bosnio kaj Hercegovino de la 17-a ĝis la 20-a de novembro 89. La delegacio ĉeestis solenan kunvenon okaze de la 40-jariĝo de ELBKĤ, publikan prezenton de la ĵus aperinta antologio de novelaro kaj partoprenis en konsiligo por junularaj gvidantoj. Fine de la vizito estis subskribita kontrakto inter ĈEA kaj ELBKĤ (vidu sur pg. 2), kiu antaŭvidas precipe intensan kunlaboron sur la kultura kaj turisma kampoj.

D-ro So Gilsu prelegis en Bosnio-Hercegovino kaj Ĉeĥoslovakio.

Okaze de la vizito al Jugoslavio, d-ro So Gilsu, nova estrarano de UEA, la 16-an de januaro 1990 gastis en Sarajevo. Dum la tago d-ro So Gilsu renkontigis kun kolegoj-profesoroj kaj studentoj de la Ekonomika fakultato en Sarajevo, estis akceptita ĉe estraro de la junulara sociopolitika organizaĵo, intervjuigis por radio kaj gazetaro, kunvenis kun reprezentantoj de E-Ligo de BkĤ kaj vespere prelegis por trideko da personoj en la Universitata E-Klubo pri "E-movado en Azio". Radio Sarajevo kaj "Vespera gazeto" publikigis longajn artikolojn pri la vizito de d-ro So Gilsu.

La 20-an de januaro d-ro So Gilsu gastis en Banjaluka, en kies Kulturdomo por cento da personoj publike prelegis pri evoluo de la moderna korea ekonomio. Pri tio raportis Televido Sarajevo en regiona programo.

Pri sia estado en Ĉeĥoslovakio d-ro So rakontis en revuo "Esperanto" jenon:

Denove en Ĉeĥoslovakio mi frontis preskaŭ diktatoran, sed tre bonan programon. La administreto de Slovacia Esperanto-Asocio en Poprad ege imponis: temas nur pri malgranda urbo, sed ties estraro faris tiel bonan oferton al la esperantistoj, ke ili ne povis rifuzi. Nun al la du konstruaĵoj en la urbocentro aldoniĝis kastelo ĉirkaŭ tridek kilometrojn for. Ĝin ili baldaŭ ekrenovigos, cele al eta konferencejo, espereble ankaŭ presejo. En Bratislava kaj Prago mi prelegis antaŭ neesperantistaj ekonomikistoj, tre sukcese. Ekzemple en Bratislava la vicrektoro unue petis ke mi parolu angle, tamen post mia prelego li mem pardonpetis, ke li ne parolas Esperanton! Do, tio estis vera interŝanĝo de scienco pere de Esperanto.

Kiam en Prago mi intervjuis reprezentantojn de la Civitana Forumo kaj Publika Kontraŭ Perforto, ankaŭ ili unue dubis pri la uzado de Esperanto. La tradukado funkciis tre bone, kiel en la aliaj landoj, tamen kiam mi partoprenis en seminario de la ĉeĥa junulara asocio mi trovis ĉe pli bonan lingvonivelon ol ĉe la plenkreskuloj. Ili levis multajn demandojn pri la teknikaj aspektoj de eventuala UK en Prago, ekzemple pri la kapablo elteni ses mil kongresanojn, tial mi plene fidis pri la nivelo de la preparoj."

Antologio publike prezentita.

Nova esperantlingva eldonaĵo de ELBKĤ, "Antologio de la moderna bosnia-hercegovina novelo", estis publike prezentita la 17-an de novembro 1989 en laborista universitato en Sarajevo. Pri la verko parolis verkisto Dragoljub Jeknić, kaj pri la E-literaturo Boriša Milićević. La antologion kompilis Džemaludin Alić, kaj en ĝi estas reprezentitaj 25 la plej signifaj novelistoj, kiuj vivis aŭ kreadis en Bosnio kaj Hercegovino. La publikan prezenton ĉeestis ankaŭ kelkaj el la aŭtoroj. La gazeto kaj radio large informis pri tiu ĉi kultura arango.

Grava poeto en Esperanto.

Eldonejo ELBKĤ ĵus publikigis en Esperanto poemaron de unu el la plej grandaj jugoslaviaj poetoj Mak Dizdar. La kompilaĵo prezentas preskaŭ kompletan esperantigon de lia la plej fama kolekto "Ŝtona Dormanto", por kiu li gajnis ĉefan jugoslavian kaj plurajn aliajn premiojn. La poemaron tradukis Jovan Zarković, kompilis Raziya Lagumdžija kaj nome de la eldonejo prizorgis Branko Miljko. La eldonaĵo estis bele ilustrita fare de arkitekto Buzaljko.

Esperanto-Centro Halle.

Ĵus fondiĝis "ESPERANTO-CENTRO HALLE", kiu pretendas esti memstara kaj sendependa entrepreno servanta al la E-movado rilate la disvastigon de Esperanto kaj kreadon de aplikeblecoj sur turisma, kultura kaj faka kampoj. La jenaj aktivecoj estas planitaj por 1990:

- okazigo de pluraj semajnaj intensaj Esperanto-kursoj diversnivelaĵoj en majo, oktobro kaj novembro,
- oficialaj Esperanto-ekzamenoj (oktobre kaj decembre),
- perado de turismaj vojaĝoj por esperantistoj kaj vojaĝgrupoj kun esperantista vojaĝgvidanto,
- okazigo de "ARTA SEMAJNO '90"
- eldonado de la germanlingva revuo poresperanta "Die rationelle Sprache" (la racia lingvo).

Ni deziras kunlabori kun similcelaj centroj kaj esperas, ke ili kontaktos nin. Nia adreso: ESPERANTO-CENTRO HALLE, Schleiermacherstr. 37, Halle, DDR-4020.

Intensaj Esperanto-kursoj en Halle en 1990.

La kursoj okazos inter la 8-a kaj 20-a de oktobro kaj 19-a de novembro kaj 1-a de decembro 1990 (baza, daŭriga, konversacia kaj kombinitaj kursoj). Je dispono estas bone ekipita junulara hotelo, kie eblas logi en 2- ĝis 5-litaj cambroj, kaj ricevi 4 mangojn tage. La tre efika lernado okazas ĉiutage de la 8-a ĝis la 17-a horo, tagmeze estas duhora paŭzo. Ĉar samtempe okazas bazaj kaj daŭrigaj kursoj, vi povas venigi ankaŭ viajn neesperantistajn gekonatojn, kiuj deziras lerni Esperanton en agrabla internacia etoso kaj samtempe pasigi interesajn tagojn en la historia, pli ol miljara urbo Halle, la regiona ĉefurbo de Saksio-Anhaltio. Al la programo apartenas altnivela instalita magnetofona gvidado tra la nakigdomo de la fama komponisto Georg Friedrich Handel kaj renkonto kun la E-grupoj en Halle.

SKRABLO

Skrablo (angle scrabble) estas ludo por 2, 3 aŭ 4 ludantoj. Ĝi konsistas el kreado de vortoj, simile al krucvortenigmoj. Oni ludas sur papera (kartona) plato - "ŝaktabulo" - vidu almetaĵon "A" - per paperaĵ (kartonaj) kvadratoj indikitaj per litero kaj valorpoento - vidu almetaĵon "B".

Principoj de ludo:

- Ĉiu ludanto lotumas (el skatoleto aŭ ŝaketo) po unu literon. Kiu havas la plej proksiman literon al komenco de aboco, tiu startas.
- Ĉiu ludanto lotumas po 7 literojn kaj dum la ludo ĉiam kompletigas ilin ĝis tiu nombro lotumante novajn literojn anstataŭ literoj dismetitaj sur la ŝaktabulo.
- Unuan vorton surmetas sur la ŝaktabulon la ludanto, kiu kreas la plej longan vorton (el siaj 7 literoj). Se la ludantoj havas la saman longecon de vortoj, komencas tiu, kiu laŭ punkto 1. havis la plej proksiman literon al komenco de aboco.
- La vortoj estas surmetitaj sur la ŝaktabulo horizontale - de maldekstra al dekstra flanko aŭ vertikale - de supro al malsupro. Alia direkto ne estas ebla!
- Unua ludanto surmetas la vorton sur la ŝaktabulon tiel, ke unu el literoj de vorto kuŝu sur la centra fako de la ŝaktabulo (flava).
- Dum surmetado de vorto oni povas iri nur unudirekte.
- Ĉiu plua vorto devas ligiĝi almenaŭ per unu litero al ĝis nun surmetitaj vortoj kaj dum kontakto kun alia vorto devas krei novan vorton. Vidu ekzemplon punkto 9.
- La novan vorton oni povas krei:
 - al jam surmetita vorto aldoni plua(j)n litero(j)n
 - krei novan vorton perpendikle al jam surmetita vorto
 - krei paralelan vorton tiel, por ke la tusantaj literoj kreu ĉiam novajn vortojn
 vidu ekzemplon punkto 9.
- Ekzemplo:

	M	V
1. vorto - pordeto	P	O
2. vorto - mondo	R	D
3. vorto - dorsa	N	R
4. vorto - versio	M	A
5. vorto - mal-dorsa	L	D
6. vorto - versio-j	O	R
7. vorto - regi, or', je	S	E
	I	I
- Unufoje surmetitan literon oni nek ŝanĝas nek forigas dum la tuta ludo.
- Ĵokero "X" anstataŭas iun ajn literon sen ŝanĝo ĝis la fino de la ludo.

- La ludanto povas anstataŭ surmetado de vorto ŝanĝi libervolan nombron el siaj 7 literoj lotumante novajn literojn. Li ne ricevas poentojn kaj devas atendi sian novan vicon.
- La ludo finiĝas, kiam ĉiuj literoj estas elĉerpitaj kaj neniuj ludanto povas krei pluan vorton.


Poentado:

- Unu ludanto registras poentojn de ĉiuj ludantoj.
- La valoro de literoj estas skribita sur la kvadratoj, ĵokero havas nul poenton.
- Sumo de poentoj plialtiĝas per koloraj premiaj fakoj de ŝaktabulo. Literaj premioj:
 - verda fako duobligas valoron de litero
 - blua fako triobligas valoron de litero
 Vortaj premioj:
 - flava fako duobligas valoron de ĉiuj vortliteroj inkluzive de verda aŭ blua premio
 - ruĝa fako triobligas valoron de ĉiuj vortliteroj inkluzive de verda aŭ blua premio.
 Ĉiuj premioj obligas literon aŭ vorton nur dum unua surmetado. Se premia fako estas jam okupita pli frue, oni kalkulas nur valoron de litero sur tiu fako. Se ludanto surmetas ĵokeron sur premia fako, oni kalkulas nur vortpremion, ne literpremion.
- Se ludanto kreas pli multe da vortoj, oni kalkulas ĉiun vorton memstare inkluzive de la komuna litero.
- Ekzemplo:

1. vorto - pordeto	- literoj 10 poentoj (2xT), vorto 2x	= 20 + 50
2. vorto - mondo	- literoj 8 poentoj	= 8
3. vorto - dorso	- literoj 9 poentoj (3xR)	= 9
4. vorto - versio	- literoj 7 poentoj, vorto 2x	= 14
5. vorto - maldorsa	literoj 12 poentoj (3xA)	= 12
6. vorto - versioj	- literoj 12 poentoj	= 12
7. vorto - regi	- literoj 12 poentoj (2xI), vorto 2x	24
	or' - literoj 2 poentoj	2
	je - literoj 6 poentoj	6 = 32
- Se ludanto surmetas dum unu metado ĉiujn 7 literojn, li gajnas premion de 50 poentoj.
- Post la fino de la ludo oni subtrahas nesurmetitajn literojn de la sumo de ludanto. Se iu ludanto surmetis ĉiujn siajn literojn, oni aldonas al li nesurmetitajn poentojn de literoj de ceteraj ludantoj.

Eva Konečná, Třinec

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15



Horizontale:

- A. Autosimbolo de Sokolov - la unua parto de la kashfraso - iuspeca.
- B. Kemia simbolo por uranio kaj plateno - dolcaj terpomoj - sufikso signifanta neceson.
- C. Barikadi - reputaci' - agrabla odor'.
- D. Signo de tuno - la kvina parto de la kashfraso - kemia simbolo por jodo.
- E. Pasado - membro - resum'.
- F. Signo de litro - riposi sur sego - kemia simbolo por kalio - kreado - autosimbolo de Italujo.
- G. Prepozicio montranta la lokon - silabo de kokina voĉo - angle "kapreolino" - finaĵo de pasinta pasiva participo - mallongigo de Herum Naturalium.
- H. Ano de la germana tribo - pulsati - prepozicio esprimanta proksimecon.
- I. Malnova angla unu' de termesurado - instrument' por raboti - adjektivo de alo.
- J. Speco - autosimbolo de Hispanujo - signo de aro - bezonego.
- K. La sesa parto de la kashfraso.

Vertikale:

1. La tria parto de la kashfraso - signe de diametro.
2. Kolektiva - signo de radio - en nokto.
3. Geologia formaci' de la sekunda epoko - triland'.
4. Finaĵo de esperanta adverbo - marko - autosimbolo de Pardubice.
5. Kemia simbolo por sulfuro kaj fosforo - matria hidroksido - Revolucia sindikata movado.
6. Pec' de tuto - autosimbolo de Italujo - infana adiaŭdiro - kemia simbolo por oksigeno.
7. Aerplena - skeptikec'.
8. Herba vegetaĵo kun brilflavaj floroj (ranunculus) - finaĵo de esperanta adjektive.
9. Plej malgranda ero de materio - la dua parto de la kashfraso.
10. Scie - mallongigo de "kaj" - "2" per romiaj ciferoj - kemia simbolo por fosforo.
11. Ĉefa mallongigo de "tio estas" - eleandr' - lupreni.
12. Mulo - adjektivo de atleta - indiko de raraĵo.
13. Greka dio de amo - nobela junul' akompananta kaj servanta reĝon.
14. Virino - "1" per romia cifero - hazarda lud'.
15. La kvara parto de la kashfraso - kemia simbolo de oksigeno.

Kashfraso: Citaĵo de Richard Schulz.

Helpiloj: G. Doe H. Goto I. Akr' J. Trias'

Ĉestmír Vidman, Praha 10

La estraro de ĈEA pritraktis la proponon kunvoki eksterordinaran kongreson de ĈEA kaj decidis, ke la 6-a regula kongreso de ĈEA okazos ekde la 16-a ĝis la 18-a de novembro 1990. La kongreso elektos novan Centran Komitaton de ĈEA, novan estraron kaj akceptos novan Statuton de ĈEA Esperanto-Asocio.

La Kongreso de Slovakia Esperanto-Asocio okazos de la 28-a ĝis la 30-a de septembro 1990 en Poprad.

La Paco sekcio de ĈEA aranĝas la 6-an Pac-konferencon la 22-an kaj 23-an de septembro en Kladno, en kadro de solenaĵoj de 80-jariĝo de la Esperanto-klubo en Kladno.

En la plenkunsido de CK ĈEA la 7-an de aprilo 1990 en Prago estis restarigita la Sekcio de Katolikaj esperantistoj (IKUE). En la prepar-periodo la sekciojn gvidos s-ano Miloslav Šváček. Konferenco de la sekcio okazis la 19-an de majo 1990 en Česká Třebová.

En faka duemajna revuo Železničář (Fervoĵisto), eldonata de eldonejo MĀDAS, aperas ekde la komenco de la nuna jaro kurso de Esperanto, verkata de PhDr. Pavla Dvořáková. Acetu la revuon, abonu ĝin por via klubo. Unu n-ro kostas 6 Kčs.

Komencis funkcii la Klubo de Amikoj de la Esperanta Literaturo (KĀEL). Ĉiu aliginto kaj paginto de la jara kotizo 50 Kčs ricevas oehlingvan Bultenon kun valoraj informoj pri novaj Esperantaj libroj kaj havos prioritaton en aceto de novaĵ Esperantaj libroj el eksterlando.

Solve de la nova epistolo de la hova subtitolo: Esperanto estas subtitolo de la nova epistolo

STANTO - presorgano de ĈEA Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 Praha 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Jiří Hanousek (grafika arango), Ing. Vlastimil Kočvara, Miroslav Malovec, Jiří Patera (respondeca redaktoro), Ing. Zdeněk Pluhař kaj Helena Štruncová. Premas Podnik služeb města Liberce. Transdonita al presejo 1990-05-31. Jarabono 36 CSK, por eksterlando 48 CSK aŭ 14 NLG, inklusive de sendkostoj. Abonantoj turnu sin al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STANTO - nepravdivelaj vĉstnik Ĉeakĉeo esperantskĉeo svazu, Jilská 10, 110 01 Praha 1, vydavany pro potrebu ŉlenŉ svazu. Vychází 6x roĉnŉ. Redakĉní rada: Jiří Hanousek (grafická úprava), Ing. Vlastimil Kočvara, Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor), Ing. Zdeněk Pluhař a Helena Štruncová. Povolen oĉborem kultury MPP ŉ. 310006385 se dne 18. 3. 1985. Tiskne Podnik služeb města Liberce. Předáno do tisku 31. 5. 1990. Dohlédací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovné povolen Ředitelstvím pošt Praha pod ŉ.j. P/1-1267 se dne 6. 4. 1979.

R			V			R			V		R
	F			B			B			F	
		F			V	V			F		
V			F			V			F		V
				F				F			
	B			B			B			B	
		V			V	V			V		
R			V			F			V		R
		V			V	V			V		
	B			B			B			B	
				F				F			
V			F			V			F		V
		F			V	V			F		
	F			B			B			F	
R			V			R			V		R

A ₁	A ₁	C ₅	E ₁	F ₃	H ₅	I ₁	K ₁	L ₁	M ₁	O ₁	O ₁	R ₁	S ₁	T ₁	U ₂	V ₂
A ₁	A ₁	D ₃	E ₁	F ₃	H ₅	I ₁	K ₁	L ₁	M ₁	O ₁	P ₁	R ₁	S ₁	T ₁	U ₂	Z ₈
A ₁	B ₂	D ₃	E ₁	F ₃	H ₁₀	I ₁	K ₁	L ₁	N ₂	O ₁	P ₁	R ₁	S ₁	T ₁	U ₂	X
A ₁	B ₂	D ₃	E ₁	G ₃	I ₁	J ₅	K ₁	M ₁	N ₂	O ₁	P ₁	R ₁	S ₁	U ₂	U ₁₀	X
A ₁	B ₂	E ₁	E ₁	G ₃	I ₁	J ₈	L ₁	M ₁	N ₂	O ₁	P ₁	R ₁	S ₄	U ₂	V ₂	X
A ₁	C ₅	E ₁	E ₁	G ₈	I ₁	K ₁	L ₁	M ₁	O ₁	O ₁	P ₁	S ₁	S ₄	U ₂	V ₂	X

Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10

NOVINY

Zahlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979

ASOCIO
KV SVAZ